

# La regrifuzanto

kaj aliaj budhismaj  
fabeloj

rerakontitaj de

Gunnar Gällmo

(c) Gunnar Gällmo 2006

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe  
<http://www.lulu.com>

## **Enhavo**

La regrifuzanto  
Vojuleto, la eterna komencanto  
La aproj kaj la tigro  
Nandio, la cervo  
La birdkaptisto kaj la koturnoj  
La monaĥo kiu pensadis tro  
Fingroringo

La bazaj detaloj de la rakontoj troveblas en la mezepokaj komentarioj, verkitaj de Buddhaghosa, al la kanonaj tekstaroj *Dhammapada* kaj *Jaataka*; sed ili estas ĉi tie tre libere uzitaj — kiel kutime inter fabelrakontantoj.



## La regrifuzanto

Iam regis reĝo en Banaraso. Li havis dek ses mil edzinojn. (Kiel li sukcesis kontentigi ilin ĉiujn? Jen interesa problemo, pri kiu multaj cerbumis, sed kiun neniu ĝis nun povis solvi.)

Dek ses mil edzinojn li havis, sed neniu el ili naskis al li infanon; kaj se reĝo ne havas infanon tio ja estas, en fabeloj, tre grava problemo, ĉar en fabeloj ŝtatreganto prefere estu ŝtatregantido.

Do la popolo diris al la reĝo ke ĉi tio ne taŭgas. Li devas preĝi al la dioj kaj peti ilin doni al li filon. Kaj tiel li faris, kaj ordonis al ĉiuj siaj edzinoj fari same. Kontraŭ dek ses mil virinoj eĉ la dioj luktas vane, li pensis.

Sed la dioj eble pensis malsame, ĉar ili donis neniun respondon, kvankam la reĝo kaj ĉiuj liaj edzinoj preĝis, preĝadis, preĝantis, preĝegis, al la altaj dioj, al la iom malpli altaj dioj, al la ne tre altaj sed eble pli kontakteblaj dioj, al la suno, al la luno kaj al ĉiuj steloj (aŭ almenaŭ al tiuj steloj kiuj estas videblaj per la nuraj okuloj, ĉar teleskopoj ne ankoraŭ ekzistis).

La ĉefedzino nomiĝis Ĉando, plej bona el ĉiuj virinoj, fakte pli bonkora ol preĝema; do eble ĝuste ŝi malpli preĝis ol la aliaj reĝinoj, sed anstataŭe ŝi pensis, iun tagon de plenluno:

"Mi ne povas memori ke mi iam ajn, dum ĉi

tiu vivo, faris iun ajn malbonon aŭ fiaĵon; per ĉi tiu vero, mi ekhavu filon!"

Kaj kion la preĝoj de dek ses mil virinoj ne povis estigi, tion estigis la virto de unu: la trono de Indro, ĉefo de grupo de tridek tri dioj, komencis ardi. Tiam, Indro rigardis ĉirkaŭ si, por vidi ĉu iu el la ĉeestantaj dioj eble povus servi kiel volontulo, por solvi la problemon.

La bodhisatvo, la estonta Budho, ĝuste tiam vivis inter tiuj dioj. Pro antaŭaj meritaj agoj li venis tien, sed nun ne plu restis multe da tiuj meritoj. Ĉar neniuj estas vivas eterne, eĉ ne dio, li tial baldaŭ devos morti inter la dioj kaj naskiĝi en alia loko.

Do Indro demandis al la bodhisatvo, ĉu tiu eble ŝatus naskiĝi kiel homo, kiel filo de Ĉando.

"Nu, bone," la bodhisatvo diris.

Kaj tiel okazis.

Granda estis la ĝojo de la gereĝoj kaj de la popolo.

En sia nova vivo, la bodhisatvo nomiĝis Temio.

Kaj la patro de Temio vokis al si siajn konsilantojn. Li petis ilin rigardi Temion, ekzameni lin kaj diri ĉu io misas ĉe li.

Kaj la konsilantoj rigardis Temion el ĉiuj flankoj, turnis kaj tordis lin, premis kaj pinĉis lin. Poste, ili diris al la reĝo:

"Ĉio estas en ordo ĉe Temio. Nenio misas. Li fartas bonege."

Kaj tiuj vortoj ĝojigis la patron de Temio.

Kiam Temio havis la aĝon de unu monato, oni kondukis lin al la reĝo. Tiu sidigis lin sur siaj genuoj kaj ludis kun li. Ĝuste tiam, oni kondukis al la reĝo ankaŭ kvar ŝtelistojn. Li devis juĝi ilin.

Kaj dum la reĝo ludis kun sia eta filo, li kondamnis la unuan ŝteliston al mil vipobatoj, la duan al katenoj, la trian al morto per lanco kaj la kvaran al morto per palisumo.

Tiam, la princo Temio teruriĝis. Kien li venis? Ĉu tia estas la kutimo inter potenculoj?

Kaj la princo Temio pensis kaj memoris siajn antaŭajn vivojn. Li memoris sian vivon inter la tridek tri dioj. Sed li memoris ankaŭ kie li vivis antaŭ tio. Antaŭ sia dia vivo li vivis en infero, kaj tie li bolis dum okdek mil jaroj. Agrable? Ne tre.

Sed kial li do venis tien? Pro kiuj agoj li meritis tion?

Kaj la princo Temio memoris ankaŭ tion. Antaŭ sia nasko en infero li estis reĝo. Dum dudek jaroj li regis en Banaraso, en la sama urbo kie li nun ĵus naskiĝis, en la sama palaco kie li nun loĝas. Tiam, li agis same kiel lia patro nun. Ŝtelistojn kaj krimulojn oni kondukis al li, kaj li

kondamnis ilin al kruelaj punoj. Li torturigis ilin kaj ekzekutigis ilin.

Kaj nun li denove estas ĉi tie. Lia patro nun agas same kiel li mem agis tiutempe. Do, al lia patro okazos same kiel tiam okazis al li.

Kaj kiam Temio mem plenkreskos? Tiam li ree reĝiĝos. Tiam eble li denove agos same. Se tiel, ankaŭ al li denove okazos same kiel tiam.

Sed tion Temio ne deziris. Okdek mil jaroj en infero fakte sufiĉas.

Kaj Temio pensis: Kiel fari por ne devi iĝi reĝo?

Se li iĝos reĝo, li certe iĝos freneza. Tiel okazis lastfoje al li, kaj nun al lia patro. Eble ne eblas reĝiĝi sen freneziĝi.

Kaj Temio plupensis: Kiel fari por ne devi sidiĝi sur trono?

Estis malfacila afero. Ĉiuj deziris ke li iĝos reĝo post sia patro. Ne nur la gereĝoj tion deziris, sed ankaŭ la popolo. Sed ĉirilate la popolo eraras, Temio pensis. Eĉ se la popolo deziras monarkion, ĝi tutsimple ne rajtas devigi iun kompatindan infaneton esti princo. Monarkio ja estas perforto kontraŭ infanoj!

Kaj Temio, li pensadis kaj cerbumadis. Kaj ĉu vi povas imagi? Jam post unu tago li trovis rimedon!

Tiun tagon oni kuŝigis lin sub sunombrelo, por ke li tie dormu. Sed en la sunombrelo loĝis



diino, kiu en antaŭa vivo estis lia panjo. Nun ŝi diris al li kiel li faru, kaj tiel li faris.

Nome ĉi tiel:

La princo Temio neniam ellasis sonon. Kiam li soifis, li ne kriis. Li eltenis la soifon. Eble li mortos pro soifo, sed pli bone morti ol regi.

Kiam li malsatis, li ne kriis. Li eltenis la malsaton. Eble li mortos pro malsato, sed pli bone morti ol regi.

Kiam li pisis, li ne kriis. Estis malagrabla kuŝi en propra piso, sed pli bone morti ol regi.

Li neniam kunfrapis la manojn. Li neniam piedfrapis. Kio ajn okazis al li, li ne moviĝis.

Liaj prizorgantoj pensis:

"Lia korpo ne havas mankojn. Liaj manoj ne aspektas kiel manoj de kriplulo, liaj piedoj ne aspektas kiel piedoj de kriplulo. Lia buŝo ne aspektas kiel buŝo de mutulo, nek liaj oreloj kiel oreloj de surdulo. La kaŭzo devas esti alia. Ni vidu ĉu ni povos elpensi ĝin."

Kaj ili provis tenti lin per lakto. Ili tenis la botelon antaŭ li, sed ili ne donis ĝin al li. La princo Temio soifis. Tamen li ellasis neniun sonon. Nek moviĝis.

Nun li havis jam du jarojn. Tiam ili provis tenti lin per kukoj. Ili tenis la kukojn antaŭ li, sed ne donis ilin al li. La princo Temio malsatis. Tamen li ellasis neniun sonon. Nek moviĝis.

Nun li havis jam tri jarojn. Tiam ili provis tenti lin per fruktoj. Ili tenis la fruktojn antaŭ li, sed ne donis ilin al li. La princo Temio frandemis. Tamen li ellasis neniun sonon. Nek moviĝis.

Nun li havis jam kvar jarojn. Tiam ili provis tenti lin per ludiloj. Ili tenis la ludilojn antaŭ li, sed ne donis ilin al li. La princo Temio ludemis. Tamen li ellasis neniun sonon. Nek moviĝis.

Dum ĉiuj jaroj, li trinkis kaj manĝis nur se oni metis trinkaĵon aŭ manĝaĵon rekte en lian buŝon.

Nun li havis jam kvin jarojn. Liaj prizorgantoj pensis:

"Ĉiuj kvinjaruloj timas fajron. Ni vidu ĉu li emas protekti sin kontraŭ fajro."

Kaj ili konstruis grandan kabanon. En ĝi, ili metis plurajn pordojn. Ili kovris ĝin per palmfolioj. En tiu kabano, ili metis Temion, kaj poste ili ekbruligis ĝin.

Sed la princo Temio ne movis sin, nek ellasis eĉ la plej etan sonon. "Pli bone perei pro fajro ol regi," li pensis. Fine oni devis preni lin el la brulanta kabano.

Nun li havis jam ses jarojn. Liaj prizorgantoj pensis:

"Ĉiuj sesjaruloj timas frenezajn elefantojn. Ni vidu kion li faros se tia besto atakos lin."

Kaj grandan elefanton ili instigis ataki

Temion. Ĝi etendis siajn orelojn. Ĝi laŭte blekis. Ĝi batis la teron per sia rostro. Ĝi alkuris kiel peza lokomotivo (se oni ne tro zorgas pri la fakto ke lokomotivoj tiutempe ne ankoraŭ ekzistis).

Sed la princo Temio ne movis sin, nek ellasis eĉ la plej etan sonon. "Pli bone pereu sub piedoj de elefanto ol regi," li pensis.

Kaj la elefanto prenis lin per sia rostro, levis lin kaj milde lulis lin. Poste ĝi denove metis lin sur la teron sen fari al li iun ajn malbonon.

Nun li havis jam sep jarojn. Liaj prizorgantoj pensis:

"Ĉiuj sepjaruloj timas serpentojn. Ni vidu kion li faros se tiaj bestoj minacos lin."

Kaj ili prenis kobrojn kaj metis ilin ĉirkaŭ Temio. La serpentoj serpentumis ĉirkaŭ li, sed li ne movis sin, nek ellasis eĉ la plej etan sonon. "Pli bone pereu pro veneno de serpentoj ol regi," li pensis. Sed la serpentoj ne mordis lin.

Kaj la jaroj pasis, kaj la princo Temio iĝis ĉiam pli aĝa. Kaj liaj prizorgantoj pensis:

"Ni provis tenti lin per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ni provis timigi lin per fajro kaj bestoj. Nun ni devas provi ion alian."

Kaj ili aranĝis danĉfeston. La princo Temio estis unu el la spektantoj. Ĉiuj aliaj knaboj ridis kaj aplaudis, sed Temio ne. Li ne movis sin, nek

ellasis eĉ la plej etan sonon. Li tute ne zorgis pri la danco.

Kaj tiel daŭris, ĝis Temio havis dek ses jarojn. Tiam, lia patro pensis:

"Ĉi tio tutsimple ne taŭgas. Kiam Temio naskiĝis, ĉio ŝajnis esti bona. Sed vidu nun! Nun li havas dek ses jarojn, kaj ĝis nun li ne montris eĉ la plej etan spuron de kapablo pensi, eĉ ne sufiĉe por esti reĝo."

Kaj la patro de Temio vokis al si siajn konsilantojn kaj diris al ili:

"Kiam la princo Temio estis ĵus naskita, mi vokis vin. Mi petis vin rigardi Temion, ekzameni lin kaj diri se io misas ĉe li. Kaj vi rigardis Temion el ĉiuj flankoj, turnis kaj tordis lin, premis kaj pinĉis lin. Poste vi diris al mi: 'Ĉio estas en ordo ĉe Temio. Nenio misas. Li fartas bonege.' Sed vidu nun! Rigardu lin nun! Nun li havas dek ses jarojn, kaj ĝis nun li ne montris eĉ la plej etan spuron de kapablo pensi, eĉ ne sufiĉe por esti reĝo. Li ja estas idioto! Kiam vi ne informis min jam tiam? Ĉi tio tutsimple ne taŭgas. Temio ne povos iĝi reĝo. Kion ni faru?"

La konsilantoj de la reĝo respondis:

"Kiam la princo Temio estis ĵus naskita, ni rigardis lin. Ni ja rimarkis ke io ĉe li ne estas ĝusta, sed ni ne kuraĝis diri tion al vi, ĉar ni ne

sciis kiel vi traktus nin se ni farus tion. Vi ja estas nia alta protektanto."

"Sed," la reĝo diris, "ĉi tio ja ne povas daŭri. La princo Temio ja estas tro stulta eĉ por esti reĝa. Li kronprinco? Ho ne! Li reĝo? Eĉ pli malbone! Do kion fari?"

Kaj la konsilantoj de la reĝo respondis:

"Vi tute pravas. La princo Temio fakte estas tro stulta por iĝi reĝo. Se li reĝiĝos, la monarkio fiaskos. Tial, prenu kelkajn aĉajn ĉevalojn kaj metu ilin antaŭ aĉa ĉaro. Kuŝigu la princon Temio en la ĉaro kaj lasu lin forlasi la urbon tra la okcidenta pordo — okcidento ja signifas malbonŝancon, ĉar okcidente la suno malsupreniras. Poste, vi enterigu lin okcidente de la urbo."

Al tio, la reĝo konsentis. Li trovis la konsilon bona.

Sed la reĝino estis informita, kaj ŝi havis alian opinion. Ŝi kuris al la reĝo kaj kriis al li:

"Sed kion vi faras? Ĉu vi ne forgesis ion? Kiam la princo Temio estis ĵus naskita vi ĝojegis, vi estis tiel ĝojplena ke vi promesis al mi ke vi plenumos iun ajn deziron mian. Ĝis nun vi neniam devis fari tion, sed nun jes ja. Finfine."

Kaj la reĝo demandis:

"Kion vi do deziras?"

La reĝino respondis:

"Mi deziras ke vi abdiku. Ke vi eksreĝiĝu. Ke la princo Temio estu reĝo jam nun."

Sed la reĝo kontraŭrespondis:

"Tio ne eblas. Kiam Temio naskiĝis, ĉio ŝajnis esti bona. Sed vidu nun! Ĉiuj bonaj infanetoj lernas piediri. Kaj paroli. Sed Temio povas nek nek. Nun li havas dek ses jarojn, kaj ĝis nun li ne montris eĉ la plej etan spuron de penskapablo, eĉ ne sufiĉe por esti reĝo. Li ja estas idioto."

Sed la reĝino Ĉando estis tute senespera. Ŝi diris:

"Eble Temio ne povas esti reĝo la tutan vivon, sed lasu lin regi almenaŭ dum sep jaroj!"

"Ne eblas," la reĝo diris.

"Do almenaŭ dum unu jaro!"

"Ne eblas," la reĝo diris.

"Do almenaŭ dum monato!"

"Ne eblas," la reĝo diris.

"Do almenaŭ dum semajno!"

"Nu, eblas," la reĝo diris. "Ja ĉiukaze estos la lasta semajno de lia vivo. Dum tiel mallonga tempo li ne povos kaŭzi tro da malbono, kaj poste mi mem denove estos reĝo."

Kaj la princo Temio iĝis reĝo. Oni metis al li liajn plej belajn vestaĵojn. Oni sidigis lin sur la trono de lia patro. Oni pendigis sur lin amason

da juveloj. Dum sep tagoj li sidis tie. Sed li ne movis sin, nek ellasis eĉ la plej etan sonon. Li lasis aliajn decidi.

La sesan tagon, la reĝino parolis al la princo Temio — pardonu, al la reĝo Temio. Ŝi rakontis al li kio okazos post tiu semajno.

Sed li ne movis sin, nek ellasis sonon.

"Morgaŭ," la reĝino diris, "vi devos morti. Morgaŭ oni enterigos vin ekster la urbo."

La princo Temio eĉ ne ŝanĝetis mienon, sed enkore li tre ĝojis. Li pensis:

"Dum dek ses jaroj mi strebis. Nun mia strebado baldaŭ atingos sian celon."

Lo koro de la reĝino Ĉando preskaŭ krevis. Temio tre ŝatus paroli al ŝi. Sed li detenis sin de tio. Li pensis:

"Se mi nun parolos, mia tuta klopodado estos vana. Se mi daŭre silentos, mi povos helpi miajn gepatrojn."

Kaj li ne diris eĉ unu vorton.

Post tiu semajno, oni forigis Temion el la trono. Oni kuŝigis lin en ĉaraĉo malantaŭ paro da eluzitaj ĉevalaĉoj, kaj la veturigisto forveturis kun li.

Sed la veturigisto ne agis tute laŭplane. La dioj konfuzis lin. Li forlasis la urbon ne tra la okcidenta pordo, sed tra la orienta — oriento ja signifas bonŝancon, ĉar oriente la suno

supreniras.

Kiam la veturigisto venis al certa distanco oriente de la urbo, la dioj levis lian ĉaron kaj forportis ĝin tri mejlojn, al densa arbaro. La veturigisto nenion rimarkis. Li kredis ke la arbaro estas la tombejo.

Kaj la veturigisto demetis de la princo Temio liajn juvelojn, flankeniris, prenis fosilon kaj komencis fosi tombon.

Sed nun, Temio opiniis, ja sufiĉas. Li pensis:

"Dum dek ses jaroj mi neniam movis min. Nun mi devas fari klopodon. Mi vidu ĉu mi ankoraŭ povas kontroli miajn muskolojn!"

Kaj Temio leviĝis. Li frotis la dekstran manon per la maldekstra, kaj la maldekstran per la dekstra. Li frotis siajn kruojn per ambaŭ manoj. Post tio, li decidis malsupreniri el la ĉaro. Tio estis malfacile, sed la tero mem leviĝis por ricevi lin, kaj tio ja plifaciligis la situacion.

Kaj Temio iris tien kaj reen kelkajn fojojn. Li sentis ke li tion kapablas. Lia korpo ankoraŭ funkciis. Li povus piediri cent mejlojn dum unu tago. Tiel forta li estis.

Sed se la veturigisto provos batali kun li? Ĉu li tiam povus superi lin?

Por prijuĝi tion li iris malantaŭ la ĉaron. Li prenis ĝin, levis ĝin per unu mano kaj svingis ĝin ĉirkaŭ sia kapo kvazaŭ ĝi estus ludilo.



Nu, li certe kapablas batali, se tio montriĝus necese.

Kaj nun li pripensis ĉu ornami sin. Li intencis preni la juvelojn en la ĉaro kaj ree pendigi ilin sur sin.

Sed supre, en la ĉielo de la tridek tri dioj, Indro sidis. Nun lia trono denove komencis ardi, kaj li komprenis kial. Li pensis:

"Mi sendis Temion al la tero. Dum dek ses jaroj li strebadis por ne iĝi reĝo. Sed nun lia strebado baldaŭ atingos sian celon. Nun li intencas ornami sin. Li intencas preni la juvelojn en la ĉaro kaj ree pendigi ilin sur sin. Sed kial li kontentigu sin per juveloj homaj?"

Kaj Indro sendis al Temio diaj juveloj, Poste, Temio aspektis kiel Indro mem.

Ornamita per ĉiuj juveloj, Temio nun iris al la veturigisto. Li iris al la tertruo, kiun la veturigisto fosis, kaj diris al li:

"He vi, kion vi fosadas ĉi tie?"

La veturigisto ne levis la rigardon. Li nur daŭre fosadis, rigardis la tertruon fosatan de li kaj diris:

"La filo de la reĝo naskiĝis kaj muta kaj kripla. Li estas idioto. Kronprinco, li? Fi! Reĝo, li? Eĉ pli fi! Laŭ la ordono de la reĝo, mi enterigos lin ĉi tie."

Sed Temio respondis:

"Mi estas nek muta nek kripla, kaj ne tiel granda idioto mi estas, fakte, se mi rajtas mem tion diri. Mi timas ke estus eraro de vi ĉi tie enterigi min."

Tiam la veturigisto fine rigardis lin kaj ekvidis Temion kun ĉiuj diaj juveloj. Sed li ne povis imagi ke Temio estas Temio. Tiel Temio ja neniam antaŭe aspektis. Li do volis scii:

"Kial vi enmiksas vin en miajn aferojn? Kial vi zorgas pri kio okazos al Temio?"

Kaj Temio respondis:

"Nu, mi kredas ke tio iomete koncernas min, ĉar Temio fakte estas mi. Nek muta nek kripla mi estas, kiel vi mem povas vidi. Cetere, mi ne estas tiel granda idioto, almenaŭ ne sufiĉe granda por iĝi reĝo. Estos eraro de vi, se vi ĉi tie enterigos min. Do mi rekomendas al vi ne fari tion."

Kaj nun la veturigisto finfine komprenis. Do li genuiĝis antaŭ Temio, petis pardonon kaj diris:

"Venu, princo Temio! Akompanu min reen al la palaco! Estu nia reĝo kaj regu nian landon. Kion farus homo kiel vi en la arbaro?"

Sed Temio respondis:

"Mi ne volas esti reĝo. Mi ne volas regi aliajn. Kiu iĝas reĝo, tiu certe iĝas freneza. Aŭ jam estas. Mi restos ĉi tie kaj vivos sola. Mi estos ermito."

La veturigisto petis, petadis, petantis, petegis Temion iĝi reĝo, sed vane. Temio rifuzis. Li nepre ne volis reiri al la palaco.

Tiam la veturigisto pensis:

"Ĉi tiu princo forĵetas sian princecon kiel rubon. Nu, do ĝi ja estas rubo, mi supozas. Sed se ne valoras esti reĝo, ĉu do valoras esti reĝa veturigisto? Kial mi revenus al la palaco, se la princo Temio ne faros tion? Mi restos ĉi tie. Ankaŭ mi estos ermito."

Kaj li diris tion al Temio. Sed Temio pensis:

"Se mi permesos ke la veturigisto restu ĉi tie, tio ne estos bone por miaj gepatroj. Tiam, ili ne rehavos siajn cevalojn, ĉaron kaj juvelojn."

Kaj li diris tion al la veturigistom, kaj tion la veturigisto komprenis.

Do la veturigisto reiris sola al la palaco, kun la ĉevaloj, ĉaro kaj homaj juveloj, kaj en la palaco li renkontis la reĝinon Ĉando.

Kaj li diris al ŝi:

"La princo Temio ne estas muta, nek kripla, nek eĉ iomete idiota. Li nur ne volas iĝi reĝo, ĉar reĝo li estis antaŭe, en pasinta vivo. Dum dudek jaroj li estis reĝo en Banaraso. Kiam li poste mortis, li renaskiĝis en infero, kaj tie li bolis dum okdek mil jaroj, kaj li opinias ke tio sufiĉas. Li diras ke kiu iĝas reĝo, tiu certe iĝas freneza. Se ne jam estas. Sed se vi volas

renkonti lin, mi scias kie li nun estas."

Kaj la reĝino informis la reĝon, kaj ambaŭ iris al la arbaro kaj parolis kun Temio. Ili provis revenigi lin, sed vane.

Kaj okazis pli. Temio parolis al siaj gepatroj, kaj post tio, ankaŭ ili ne deziris reiri al la palaco. Ankaŭ ili volis iĝi ermitoj.

Kaj tiel okazis. Ne nur al tiuj du, sed ankaŭ al la ceteraj dek kvin mil naŭcent naŭdek naŭ reĝedzinoj.

Kaj la homoj loĝantaj en Banaraso tutsimple forlasis la urbon. Ankaŭ ili volis iĝi ermitoj. Ili lasis la pordojn de siaj domoj malfermaj kaj iris al la arbaro kaj Temio.

En najbara lando regis alia reĝo. Li aŭdis ke la reĝo de Banaraso iĝis ermito. Kaj li pensis:

"Ĉiu lando havas armeon, aŭ propran aŭ mian. Jen ŝanco por mi!"

Kun sia armeo li iris al Banaraso, kaj vidis la tutan urbon ornamitan, sed malplenan. Li eniris la palacon. Tie li vidis ĉiuspecajn juvelojn kaj riĉaĵojn. Nur homojn ne.

Sen preni ion — eble la juveloj kaj riĉaĵoj estis iel danĝeraj? — li iris el la palaco al la placo. Sur benko tie sidis kelkaj ebriuloj, la solaj restantoj en la urbo. Ilin li demandis kie estas la reĝo. Ili diris:

"La reĝo foriris tra la orienta pordo."

Do la najbara reĝo faris same, kaj rajdis laŭ la rivero. Sed Temio aŭdis liajn pensojn. (Se oni silentas dum dek ses jaroj, oni povas lerni ankaŭ tion.) Li komprenis ke la najbara reĝo venas al li. Do Temio iris renkonte al li kaj diris al li ion, tion kaj ĉi tion. Pro tio, ankaŭ tiu reĝo iĝis ermito.

Same okazis ankaŭ al alia najbara reĝo, do tri reĝlandoj estis tutsimple malfonditaj. La dresitaj elefantoj iĝis sovaĝaj elefantoj, liberaj elefantoj, arbaraj elefantoj. La dresitaj ĉevaloj iĝis sovaĝaj ĉevaloj, liberaj ĉevaloj, ebenaĵaj ĉevaloj. La veturiloj staris en la arbaro kaj malrapide difektiĝis. La monerojn en la nacia banko oni forĵetis, ĉar oro ja taŭgas al nenio.

Ĉiuj loĝantoj de la tri landoj iĝis ermitoj. Ĉiuj komencis kompreni la vivon. Ili vivis longe, mortis poste kaj renaskiĝis inter altaj dioj.

Kaj multaj bestoj vivis proksime al la ermitoj. Ili vivis longe, mortis poste, kaj ankaŭ ili renaskiĝis inter dioj.

Jen vera fabelo.

## Vojuleto

Ĉi tio okazis kiam la Budho vivis, en la lando Magadho, en ĝia ĉefurbo Raĝagaho, en nordorienta Hindio.

En tiu urbo vivis riĉa komercisto. Li havis belan filinon, kaj ŝin li ĉiam bone gardis, ĉar neniam oni povas bone scii kion faros belaj filinoj.

Kiam la knabino iĝis virino, la patro konkukis ŝin al granda palaco. Ĝi havis sep etaĝojn. La filino devis loĝi en la plej supra etaĝo el la sep, kaj neniam forlasi ĝin.

Ankaŭ la palaco estis bone gardata. La patro volis esti certa ke la filino ne estu kune kun viro ne de li elektita.

Sed tio ne helpis, ĉar oni neniam povas bone scii kion faros belaj filinoj. Ĉi tiu filino havis sklavon. Lin ŝi freneze amis, kaj ili amaris. Poste ŝi ektimis. Se iu ekscios kion ŝi faris, ŝi ne sciis kio okazos al ŝi.

Kaj ŝi diris al sia sklavo kaj amoranto:

"Ni ne povas resti ĉi tie. Se iu ekscios kion ni faris, povos okazi io ajn. Ni devas foriri."

Kaj tiel ili faris. Ili translokiĝis al malgranda vilaĝo, kie neniu konis ilin. Tie ili ekloĝis. Tie ili vivis kune.

Post certa tempo la virino gravediĝis. Kiam

proksimiĝis la momento de nasko, ŝi diris al sia edzo:

"Se mi naskos mian infanon ĉi tie, kie mi ne havas parencojn, ni ambaŭ havos problemojn. Mi vidas nur unu solvon. Ni devas reiri al miaj gepatroj."

Sed la edzo diris:

"Ĉu vi estas freneza? Se viaj gepatroj vidos min, ili mortbatos min!"

Kaj dum ili tiel diskutadis, tagoj pasis, kaj ili ne povis interkonsenti. Fine la virino pensis:

"Li estas stultulo. Se mi atendos lin, ni neniam foriros. Nun mi iros sola."

Kaj tiel ŝi faris. Ŝi kaptis la okazon kiam la edzo estis ekstere. Tiam ŝi kolektis siajn havaĵojn, informis la najbarojn kaj iris for.

Kiam la edzo venis hejmen, ŝi ne plu estis tie. Li maltrankviliĝis kaj demandis la najbarojn, ĉu ili scias kien ŝi iris. Ili informis lin pri ŝiaj planoj, li postkuris ŝin kaj atingis ŝin ie sur la ŝoseo.

Sed ŝi estis jam tro longe atendinta. Nun ŝi apenaŭ havis tempon iri flanken kaj kuŝiĝi sub arbo, kaj ek — filo naskita! Post tio, kompreneble ne plu valoris la penon iri al ŝiaj gepatroj. Do ili anstataŭe reiris al la vilaĝo.

Al la knabo ili donis la nomon Vojulo, ĉar li ja preskaŭ naskiĝis survoje.

Pasis tempo, kaj denove la virino gravediĝis, kaj denove okazis same: la virino volis reiri al siaj gepatroj kaj naski la infanon tie, sed ŝia edzo ne kuraĝis akompani ŝin tien. Ŝi do foriris sola, la edzo postkuris ŝin, kaj ŝi naskis ankaŭ sian duan filon apud la ŝoseo, post kio la tuta familio iris hejmen.

La unuan knabon, kiun ili unue nomis Vojulo, ili nun renomis Vojulego, kaj al la dua ili donis la nomon Vojuleto.

Kaj la jaroj pasis.

Ĉi tio okazis en kulturo, kie familio tre gravis. Ne nur gepatroj kaj gefratoj, sed ankaŭ geonkloj, geavoj, genepoj, genevoj kaj gekuzoj. Sed ĉi tiuj fratoj havis nur siajn gepatrojn, krom unu la alian, kompreneble. Ili estis apartaj.

Iun tagon Vojulego demandis al sia patrino:

"Ĉu ni havas neniujn parencojn? Ĉiuj aliaj en ĉi tiu vilaĝo ja havas."

Ŝi respondis:

"Certe ni havas. Ne en ĉi tiu vilaĝo, sed en la granda urbo Raĝagaho. Tie loĝas miaj gepatroj, viaj geavoj. Via avo estas tie riĉa komercisto. En Raĝagaho, ni havas ankaŭ multajn aliajn parencojn."

Do la knabo demandis:

"Sed kial ni neniam vizitas ilin?"

Al tiu demando, lia patrino volis nenion



respondi. Sed la knabo ripetis la demandon, ripetadis kaj gurdadis ĝin. Fine, lia patrino diris al sia edzo:

"Nun mi ne plu eltenas. La knabo nur ripetas, ripetadas kaj gurdadas la saman demandon. Ĉu vi kredas ke miaj gepatroj manĝos nin se ili revidos nin? Nun ni fakte devas viziti ilin. La infanoj ja rajtas renkonti siajn geavojn."

Ŝia edzo respondis:

"Mi ne kuraĝas renkonti viajn gepatrojn, sed mi akompanos vin al Raĝagaho."

Kaj ili foriris, ĉiuj kvar. Veninte al Raĝagaho, ili ekloĝis en hotelo proksime al la urba pordego. De tie, ili sendis mesaĝon al la gepatroj de la virino, kaj tiuj respondis per la sama mesaĝisto:

"Viaj infanoj estas bonvenaj ĉe ni, sed vin mem ni neniam plu volas vidi. Malaperu!"

Do, ambaŭ knaboj akompanis la mesaĝiston al siaj geavoj, sed iliaj gepatroj reiris al la vilaĝo. Ili neniam plu vidis siajn infanojn, tiuj neniam plu vidis ilin, kaj tiel ili malaperas el ĉi tiu rakonto.

Nun ĉi tio okazis dum vivis la Budho, kiu ofte vizitadis Raĝagahon. Vojuleto ankoraŭ estis tre eta, sed Vojulego kutimis akompani sian avon kiam li vizitis la Budhon por aŭskulti lin.

Fine, Vojulego sentis ke li volas iĝi monaĥo. Li volis iri la vojon iritan de la Budho, ekzerci sin same kiel ekzercis sin la Budho, evoluigi sin same kiel evoluigis sin la Budho. Kaj Vojulego demandis al sia avo, ĉu li rajtas monaĥiĝi. La avo respondis:

"Kion vi diras? Vi ne povas doni al mi pli grandan ĝojon ol se vi iĝas monaĥo, se vi iras la vojon iritan de la Budho."

Kaj la avo iris kun Vojulego al la Budho. Tiu demandis al li:

"Kun kiu vi venas?"

La avo respondis:

"Kun mia nepo. Li volas iĝi monaĥo ĉe vi. Ĉu li rajtas?"

"Jes ja," la Budho diris.

Kaj tiel Vojulego monaĥiĝis.

Vojulego estis rapida pensanto. Li rapide parkerigis multajn paroladojn de la Budho, kaj li rigardadis sin mem kaj sian ĉirkaŭaĵon sen lasi la pensojn kuri libere. Li faris nur po unu aferon, kaj tiam li ne pensis pri aferojn aliajn.

Tiel li tre evoluis. Li iĝis tre trankvila. Nenio maltrankviligis lin. Nenio perturbis lin. Li vidis sin mem tia, kia li fakte estas, ne kia li dezirus esti. Li ĉesis trompi sin mem.

Unu tagon, Vojulego ekpensis pri sia frato. Li pensis:

"Kion mi spertis, tion ankaŭ mia fratu devus povi sperti. Se mi kapablas trankviliĝi, certe ankaŭ Vojuleto kapablas trankviliĝi. Se mi povas vidi min mem tia, kia mi fakte estas, kaj ne kia mi dezirus esti, do ankaŭ Vojuleto povas tion, certe. Se mi povas ĉesi trompi min mem, kial ankaŭ Vojuleto ne tion povus?"

Kaj Vojulego iris al sia avo kaj diris al li:

"Kara avo, se tio ne malplaĉas al vi, mi dezirus ke ankaŭ Vojuleto monaĥiĝu."

La avo respondis:

"Kion vi diras? Vi ne povas doni al mi pli grandan ĝojon ol se vi monaĥigas ankaŭ Vojuleton."

Kaj Vojulego monaĥigis Vojuleton. Li provis instrui al li kiel li faru. Unue li laŭtleĝis al li etan verson, simplan etan verson kvarlinian, pri la Budho, kaj petis lin parkerigi ĝin.

Sed Vojuleto ne similis al sia frato. Male al tiu, li ne estis rapida pensanto. Li klopodis kaj klopodadis, li studis kaj studadis, sed li ne sukcesis.

Unue li parkerigis la unuan linion. Tio postulis longan tempon. Poste li parkerigis la duan linion. Ankaŭ tio postulis longan tempon. Kaj kiam li finfine regis la duan linion, li estis jam forgesinta la unuan.

Post kvar monatoj li ankoraŭ ne parkerigis

la etan verson, la simplan etan verson kvarlinian, pri la Budho.

Tiam lia frato ekkoleris, kaj Vojulego diris al Vojuleto:

"Ĉi tio ne taŭgas. Vi ne kapablas esti monaĥo. Vi ja estas stulta, ja eterna komencanto. Eĉ post kvar monatoj vi ankoraŭ ne parkerigis la etan verson, la simplan etan verson kvarlinian, pri la Budho. Do, vi ne povas resti ĉi tie. Reiru hejmen!"

Tiam, Vojuleto ekmalĝojis. Li tre ŝatis la Budhon. Li volegis resti monaĥo. Li tute ne volis reiri al sia avo.

Nun venis viro al la monaĥejo, kie vivis Vojulego kaj Vojuleto, kaj kie ĝuste tiam vivis ankaŭ la Budho. La nomo de tiu viro estis Ĝivako. Li iris unue al la Budho, salutis lin respektoplene kaj aŭskultis lian paroladon. Poste, Ĝivako iris al Vojulego kaj demandis al li:

"Kiom da monaĥoj vivas kune kun la Budho ĝuste nun?"

Vojulego respondis:

"Kvincent."

Ĝivako diris:

"Do lasu la Budhon kaj la kvincent monaĥojn venu al mia hejmo morgaŭ antaŭtagmeze, por ke mi povu regali ilin per

tagmanĝo."

"Koran dankon," Vojulego respondis. "Tio estas aranĝebla por ni ĉiuj, krom por mia frato Vojuleto. Li ne rajtas esti kun ni, ĉar li estas stulta, ja eterna komencanto. Sed ĉiuj aliaj volonte venos al vi."

Ĉi tion Vojuleto aŭdis. Li pensis:

"Mia frato akceptas la inviton por si mem. Li akceptas ĝin por la aliaj. Sed li ne akceptas ĝin por mi. Li diras ke mi estas tro stulta por rajti esti kune kun la aliaj. Mia frato ne plu ŝatas min. Kial mi do restu ĉi tie en la monaĥejo? Mi same bone povas reiri hejmen. Ĉi tie mi ja ne estas bonvena."

La venontan matenon, tre frue, li ellitiĝis kaj preparis sin por forlasi la monaĥejon.

La saman matenon, tre frue, ankaŭ la Budho ellitiĝis. Li komprenis kio okazis, kaj kion Vojuleto intencas fari. Do li iris antaŭ Vojuleto al la monaĥeja pordo, kaj tie li komencis piediri tien kaj reen, sur la ŝoseo kie Vojuleto intencis iri hejmen.

Kiam Vojuleto atingis la pordon, li salutis la Budhon kun granda respekto. Kaj la Budho diris al Vojuleto:

"Kien vi iras tiel frue en la mateno?"

Vojuleto respondis:

"Mi reiras hejmen, ĉar ĉi tie mi ne estas

bonvena. Mia frato ne plu ŝatas min. Li diras ke mi estas tiel stulta ke mi ne rajtas esti kune kun vi. Viro venis ĉi tien. Lia nomo estas Ĝivako. Li volas inviti al tagmanĝo vin kaj mian fraton kaj ciujn kvincent monaĥojn. Mia frato akceptis la inviton por vi. Li akceptis la inviton por si mem. Li akceptas ĝin por ĉiuj monaĥoj, krom por mi, ĉar li opinias ke mi estas tro stulta, ja eterna komencanto."

Tiam la Budho diris:

"Vojuleto, mi kaj neniuj aliaj monaĥoj vian fraton. Mi kaj neniuj aliaj lasis lin monaĥi vin. Kiam via frato forĉasis vin, kial vi ne venis al mi? Vi tute ne reiru hejmen. Kial vi farus tiel? Vi restu ĉe mi."

Poste, la Budho akompanis Vojuleton al sia propra kabano, kaj sidigis lin ekster ĝi. Kaj la Budho donis al Vojuleto puran, blankan tukon. Li diris:

"Nun sidu ĉi tie. Frotu ĉi tiun puran, blankan tukon per ambaŭ manoj, kaj diru al vi mem: 'Malpuraĵo malaperas! Malpuraĵo malaperas!'"

Ĝuste tiam venis iu kaj diris, ke nun estas tempo iri al la hejmo de Ĝivako kaj tie tagmanĝi. Do la Budho kolektis ĉiujn monaĥojn — krom Vojuleto, kompreneble, ĉar tiu ja ne estis invitita — kaj iris al la hejmo de Ĝivako.

Nun Vojuleto eksidis kaj ekfrotis per ambaŭ

manoj la tukon, la puran, blankan tukon donitan de la Budho, kaj diris al si mem: 'Malpuraĵo malaperas! Malpuraĵo malaperas!'"

Sed dum li frotis kaj frotadis la tukon, tiu pli kaj pli malpuriĝis. Malpuraĵo aperis, ne malaperis. Tiam Vojuleto pensis:

"Antaŭe, ĉi tiu tuko estis pura kaj blanka. Nun ĝi estas malpura kaj griza. Tia ĝi iĝis pro miaj manoj. Tia ĝi iĝis pro mia korpo. La tuko ne plu estas tia, kia ĝi estis antaŭe. Nenio ankoraŭ estas tia, kia ĝi estis antaŭe. Ne tute. Kaj nenio estos tia, kia ĝi estas nun. Ne tute. Ĉio ĉiam ŝanĝiĝas."

Kaj kiam li pensis tion, kaj fiksis al tio ĉiujn siajn pensojn, li ekkomprenis kiel ĉio vere estas. Ne nur per la kapo li tion komprenis, sed per la tuta korpo kaj per la tuta psiko. Li ĉesis deziri ke ne ŝanĝiĝu la nepre ŝanĝiĝonta, ke ne aliiĝu la nepre aliiĝonta. Kaj kiam li faris tiel, vidu! li iĝis same saĝa kiel sia frato.

Samtempe, en la hejmo de Ĝivako, sidis la Budho kaj Vojulego kaj ĉiuj monaĥoj — krom Vojuleto, kompreneble, ĉar tiu ja ne estis invitita, kiel jam dirite. Kaj Ĝivako volis regali ĉiujn per manĝaĵo. Li volis meti la manĝaĵon en iliajn bovlojn, unue en tiu de la Budho.

Sed tiam la Budho kovris sian bovlon per la mano, kaj demandis:

"Diru al mi, ĉu ne restas en la monaĥejo monaĥoj?"

Vojulego respondis:

"Ho ne. Ne restas en la monaĥejo monaĥoj. Nur mia frato, Vojuleto, kaj li ne plu rajtas esti monaĥo, ĉar li estas stulta, ja eterna komencanto. Li dum kvar monatoj provis parkerigi etan verson, simplan etan verson kvarlinian, pri la Budho. Eĉ ne tion li kapablis, do li ne taŭgas esti monaĥo. Ho ne, ne restas monaĥoj en la monaĥejo."

"Vojulego," Budho diris, "vi eraras. Ja restas en la monaĥejo monaĥoj, multaj."

Vojulego respondis:

"Ĉu? Mi komprenas nenion."

"Ja tion mi komprenas," la Budho diris. "Sed se vi sendos iun al la monaĥejo, vi vidos ke restas en la monaĥejo monaĥoj, multaj."

Kaj Ĝivako sendis al la monaĥejo unu el siaj servistoj.

Samtempe, Vojuleto sidis en la monaĥejo. Nun li iĝis tiel sperta, ke li povis aŭdi la pensojn de sia frato, kaj li pensis:

"Mia frato diras ke ne restas monaĥoj en la monaĥejo, sed mi montros al li ke ja restas en la monaĥejo monaĥoj, multaj."

Kaj li multobligis sin — ĉar eĉ tiel sperta li nun estis. Do nun subite estis en la monaĥejo



monaĥoj, multaj, ja mil.

Kelkaj monaĥoj kudris vestaĵojn. Kelkaj monaĥoj tinkturis vestaĵojn. Kelkaj monaĥoj laŭtleĝis la sanktajn tekstojn. Subite estis en la monaĥejo monaĥoj mil, kaj ĉiuj faris malsamajn aferojn.

Kaj tio ne estis malsperte farite de Vojuleto, ĉar se monaĥo kapablas multoblige sin, li kutime tamen povas fari nur unu aferon, la saman aferon, per ĉiuj siaj korpoj; sed Vojuleto estis pli sperta ol tio.

Kaj la servisto de Ĝivako venis al la monaĥejo. Sed kiam li vidis ke en la monaĥejo estas mil monaĥoj, li tute konfuziĝis. Li komprenis nenion.

Do li reiris al Ĝivako, kaj tien veninte, li diris al la Budho:

"La tuta monaĥejo ja estas plenplena je monaĥoj. Kion mi nun faru?"

La Budho respondis:

"Reiru al la monaĥejo kaj diru: 'La Budho volas renkonti Vojuleton.'"

Do, la servisto faris tiel. Sed kiam li revenis al la monaĥejo kaj diris ke la Budho volas renkonti Vojuleton, tiam ĉiuj mil monaĥoj en la monaĥejo kriis:

"Mi estas Vojuleto! Mi estas Vojuleto!"

Kaj tiam la servisto denove konfuziĝis, kaj denove komprenis nenion.

Do li re-re-iris al Ĝivako, kaj al la Budho, kaj diris:

"La tuta monaĥejo plenplenas je monaĥoj, ja je monaĥoj mil, kaj ĉiuj mil monaĥoj en la monaĥejo krias: 'Mi estas Vojuleto! Mi estas Vojuleto!' Do, kion mi nun faru?"

La Budho diris:

"Re-re-iru al la monaĥejo kaj diru ke mi volas renkonti Vojuleton, kaj kiam la monaĥoj diras, ke ĉiu el ili estas Vojuleto, vi prenu la manon de la unua kiu diras tion. Tiam malaperos ĉiuj aliaj. Poste vi re-re-re-venu ĉi tien, kaj tiun monaĥon vi kunvenigu."

Do, la servisto faris tiel, kaj okazis ĝuste kiel antaŭdiris la Budho. Kiam ĉiuj monaĥoj diris: "Mi estas Vojuleto! Mi estas Vojuleto!", tiam la servisto notis kiu tion diris unue. De tiu, li prenis la manon. Tiam malaperis la aliaj, kaj la servisto kaj Vojuleto finfine iris kune al la domo de Ĝivako, kaj al la Budho, kaj al ĉiuj monaĥoj tie ĝis tiam manĝontaj, sed nun post longa atendo manĝantaj.

Postmanĝe, la Budho diris al Ĝivako:

"Prenu la bovlon de Vojuleto! Tiam li benos vin kaj deziros al vi ĉiun bonon, kaj cetere diros al vi kelkajn verajn vortojn."

Do Ĝivako prenis la bovlon de Vojuleto, kaj Vojuleto ekparolis. Li longe paroladis, kaj elokvente, kaj li pritraktis ĉion, kion la Budho

kutime instruis.

Kaj tamen li antaŭe dum kvar monatoj provis parkerigi etan version, simplan etan version kvarlinian, pri la Budho, kaj ne povis.

Kiam Vojuleto finis sian paroladon, la Budho kaj ĉiuj monaĥoj ekstaris kaj reiris al la monaĥejo; kaj kiam la Budho fine estis sola kun Vojulego, li diris:

"Vojulego, vi lernis ĉion pri vi mem, sed vi ne lernis ĉion pri aliaj. Certe, vi kutime pensas pli rapide ol via frato; sed ne ĉiam pli ĝuste."

## La aproj kaj la tigro

Iam, antaŭ tre, tre longa tempo, vivis ĉarpentisto. Li vivis en vilaĝo tuj ekster Banaraso.

Iun tagon, li iris al la arbaro por haki arbojn. Tiam li trovis etan apron, apridon, kiu falis en tertruon. La ĉarpentisto kompatis la apreton, portis ĝin al sia hejmo kaj zorgis pri ĝi.

Kaj la apro kreskis, kaj li komencis helpi la ĉarpentiston en lia laboro. Per sia muzelo, li elfosis la radikojn de la arboj, kaj tiel faligis la arbojn. Poste li trenis ilin al la hejmo de la ĉarpentisto. Li ankaŭ lernis porti ilojn per sia buŝo.

Nun la apro kreskis kaj kreskadis, kaj fine li estis grandega. La ĉarpentisto amis lin kvazaŭ propran filon. Sed li timis ke iu faros malbonon al lia apro. Multaj vilaĝanoj ne ŝatis la apron de la ĉarpentisto. Tion ili montris senkaŝe.

(Apro ja fakte estas sovaĝa porko, kaj porkoj ne estas en ĉiuj rondoj popularaj.)

Tial la ĉarpentisto pensis ke pli bone estas, se li liberigos sian apron. Do iun tagon, li akompanis la apron al la arbaro. Tie li lasis lin, kaj sola li reiris hejmen.

Nun la apro de la ĉarpentisto komprenis, ke por li estos malfacile vivi sola en la arbaro. Li devas

trovi siajn parencojn, trovi apraron.

Dum longa tempo li serĉis. Fine li trovis apraron, gregon de aproj. Li iris al la aproj, kaj li diris al ili:

"Saluton! Mi dum longa tempo vivis for de miaj samspecanoj. Kiam mi estis eta, miaj gepatroj perdis min. Tial mi kreskis inter homoj. Sed nun mi revenis al la aproj, kaj eĉ se mi havas iomete homan kapon, mi esperas ke mi ankoraŭ povas vivi vere porke. Mi tre ŝatus aliĝi al via grego. Ĝi ŝajnas al mi havi bonan etoson. Cetere, ŝajnas ke ĉi tie eblas trovi sufiĉe da manĝaĵoj, radikojn kaj fruktojn kaj aliajn aĵojn. Do mi pensis, ke se mi vivos kun vi, mi estos protektata kontraŭ danĝeroj kaj malamikoj."

Tiam unu el la aproj respondis:

"Pri tio vi eraras. Certe vi rajtas aliĝi al nia grego, se vi tion volas. Kaj certe troveblas ĉi tie sufiĉe da manĝaĵoj, radikoj kaj fruktoj kaj aliaj aĵoj. Sed ne imagu ke, se vi vivos kun ni, vi estos protektata kontraŭ danĝeroj kaj malamikoj. Se vi deziras tion, vi preferinde serĉu alian gregon. Ĉi tie ni vivas en ĉiama danĝero, ĉar ni havas fortan kaj kruelan malamikon. Li ĉiam prenas la plej bonan inter ni."

"Ĉu?" diris la apro de la ĉarpentisto. "Kia malamiko estas tio? Informu min! Kiu estas via forta malamiko? Kiu estas tiel kruela al vi, kaj ĉiam prenas la plej bonan inter vi — sed tamen

ne ankoraŭ la lastan, evidente? Informu min!"

"Li estas granda kaj forta reganto," la alia apro respondis. "Lia tuta haŭto estas plena de strioj. Li havas akrajn dentojn. Per ili li povas mordi kaj ŝiri. Same akraj estas liaj ungoj."

"Sed," diris la apro de la ĉarpentisto, "ĉu tio estas kaŭzo timi lin? Ĉu ni mem ne plu havas fortojn? Ĉu ni mem ne havas dentegojn, per kiuj ni mem povas piki kaj ŝiri? Ĉu ni ne estas samgreganoj? Ĉu ni ne estu porkaranoj? Kune ni povos atingi finan venkon. Malkune ne. Ĉu ni provu?"

"Estas tre agrable," la alia apro diris, "aŭdi vin paroli tiel. Tio donas kuraĝon al ni."

Tiam la apro de la ĉarpentisto turnis sin al la ceteraj greganoj. Li demandis:

"Je kiu horo la tigro kutime venas?"

"Hodiaŭ," ili respondis, "li venis frumatene. Li mortigis unu el ni, kaj fortrenis lin. Morgaŭ li revenos je la sama horo."

Tiam la apro de la ĉarpentisto esploris la ĉirkaŭaĵojn. Li trovis sekuran lokon, kie la apraro povos vivi. Poste li diris al ĉiuj aproj ke ili manĝu dum la nokto, por ke ili ne estu malsataj frumatene, kiam la tigro venos.

La venontan matenon, frue, la apro de la ĉarpentisto kolektis ĉirkaŭ si ĉiujn apraranojn.

Ĉi tiel li aranĝis la aprojn:

En la mezo, li starigis la plej etajn apridojn.  
Ĉirkaŭ la apridetoj, li starigis iliajn patrinojn.

Ĉirkaŭ la apridetpatrinoj, li starigis la aprinojn senapridajn.

Ĉirkaŭ la aprinoj senapridaj li starigis la apridojn iom pli aĝajn.

Ĉirkaŭ la apridoj iom pli aĝaj, li starigis la junajn aprojn, kiuj ĵus ekhavis dentegojn.

Ĉirkaŭ la ĵus denteghavintaj aproj, li starigis la pli aĝajn aprojn kun dentegoj gigantaj.

Ĉirkaŭ la gigantdenteghavantaj aproj, plej ekstere, li starigis la maljunajn viraprojn, kies haŭtoj estis kovritaj de cikatroj.

Diversloke, la apro de la ĉarpentisto lokigis grupetojn da dek, dudek aŭ tridek geaproj.

Poste, li ordonis al kelkaj fortaj aproj fosi en la tero du truojn. En unu el ili li mem saltos, se necese. En la alian la tigro falos, espereble. Meze inter la du truoj li mem staros, kiam venos la tigro.

Fine, la apro de la ĉarpentisto ĉirkaŭiris al ĉiuj grupoj, kaj kuraĝigis ilin.

Intertempe, la suno leviĝis.

Proksime estis monteto, kaj sur ĝi kabano. En la kabano loĝis anakoreto. Anakoreto estas, laŭ la vortaroj, pia ermito kiu vivas sola por tiel fari bonon al si mem kaj al aliaj. Sed ĉi tiu anakoreto

ne posedis vortaron, kaj li fajfis pri tiaj difinoj. Li estis falsa anakoreto, anakoretaĉo, tute ne tiel bona kiel li ŝajnis.

Li estis amiko de la tigro. La tigro kutimis doni al li viandon, kaj li lasis la tigron dormi en lia kabano.

Kaj nun, frumatene, la tigro eliris la kabanon de la anakoreto.

La tuta apraro turnis sin al la apro de la ĉarpentisto, kaj ili ĉiuj kriis:

"Jen li! Jen nia malamiko. Nun ek!"

Kaj la apro de la ĉarpentisto diris al ili:

"Ne timu! Nur faru ekzakte kiel faros la tigro, kion ajn li faros."

Nun la tigro skuis sin, kaj pisis sur la teron. Ĉiuj aproj faris same.

Tiam la tigro rigardaĉis ilin. Li laŭte blekis. La aproj same.

Tiam la tigro pensis:

"Hodiaŭ la aproj ne agas kiel kutime. Kiam mi montras min, kutime ili forkuras. Sed hodiaŭ ne. Ili nur restas starantaj. Ne aspektas timemaj. Ŝajnas kvazaŭ iu instruis ilin kiel fari. Preferinde mi lasu ilin en paco, almenaŭ hodiaŭ."

Kaj la tigro metis sian voston inter siajn malantaŭajn kruojn kaj ŝtele reeniris al la anakoretaĉo en la kabano. Kiam la anakoretaĉo vidis la tigron veni sen predo, li mokis lin:

"Kio okazis al vi? Ĉu vi ne plu manĝas



viandon? Aŭ ĉu vi iĝis malkuraĝa? Ĉu vi ne plu volas mortigi? Aŭ ĉu vi jam komencis perdi viajn dentojn? Vi renkontis tutan gregon da aproj, kaj tamen vi ne povis mortigi eĉ unu. Kio okazis al vi?"

La tigro respondis:

"Vi ne tute malpravas. Eble miaj dentoj ne ankoraŭ komencis malfiksiĝi, sed al kio mi uzu ilin? Hodiaŭ, tiuj aproj ne agas kiel kutime. Kiam mi montras min, ili kutimis forkuri pro timo. Ili kutimis pro timo ekpisi. Sed hodiaŭ ne. Ili nur restas starantaj, flanko ĉe flanko, kvazaŭ ili ĉiuj de iu granda porko estus filoj. Kiam mi blekas al ili, ili gruntas retroe kaj tutsimple restas starantaj. Ili ne aspektas timemaj. Ŝajnas kvazaŭ iu instruis ilin kiel fari. Preferinde mi lasu ilin en paco, mi pensis; almenaŭ hodiaŭ. Ĉar se ili tiel agas kun tia konkordo, ili povas kaŭzi al mi malbonon. Eĉ mortigi min."

"Stultaĵoj," la anakoretaĉo diris. "Ĉu aglo petas permeson por preni anason? Kiam granda, forta tigro, kiel vi, ekvidas tutan gregon da aproj, tiam li prenas tiun beston kiun li deziras. Se ne, li estas malheroa. Vera poltrono."

"Stultaĵojn diras vi," la tigro diris. "Se grego de anasoj agis kun tia konkordo kia tiuj aproj hodiaŭ, tiam eĉ aglo ne povus preni anaseton."

"Pretekstoj, pretekstoj," la anakoretaĉo diris. "Vi estas maldiligenta, jen ĉio. Ĉu vi ne konas

vian propran forton? Se vi blekas nur unu fojon, kaj ĵetas vin al la aproj, tiam la tuta apraro ekkuros tiel rapide kiel ĝi nur povos. Tion mi povas promesi al vi."

Tiam la tigro pensis, ke eble tamen estas tiel. Poltrono li certe ne estas.

Do li denove eliris el la kabano, al la monteto. Tie li staris dum momento, kaj rigardis la apraron.

Ĉiuj aproj restis starantaj ĉe siaj lokoj, kaj la apro de la ĉarpentisto starigis sin inter la du tertruoj.

Nun la tigro saltis. Li ĵetis sin rekte al la loko kie staris la apro de la ĉarpentisto. Sed kiam li atingis tiun lokon, tiu ne plu estis tie, ĉar jam saltinta en sian tertruon. Kaj la tigro venis tro rapide por povi malhelpi ke li mem falu en la alian tertruon.

Tiam la apro de la ĉarpentisto kuris el sia truo kaj saltis en tiun de la tigro. Li pikis la tigron per siaj dentegoj. Li disŝiris lian korpon. Li manĝis parton de lia karno. La restantan karnon li elpuŝis el la tertruo. Poste li invitis la aliajn aprojn gustumi.

Kiam ĉiuj finmanĝis, kaj kiam nenio restis de la tigro, tiam la apro de la ĉarpentisto demandis:

"Nu?"

"Nu bone," la aliaj aproj respondis. "Ni vere

devas danki vin. Sed restas al ni ankoraŭ unu malamiko."

"Ĉu vere?" demandis la apro de la ĉarpentisto. "Kiu?"

"Anakoretaĉo," la aliaj aproj respondis. "Li loĝas en la kabano, el kiu venis la tigro. Tie li vivtenas sin per la viando, kiun la tigro donis al li."

"Sekvu min!" diris la apro de la ĉarpentisto. "Montru lin al mi. Ni ja prizorgos lin, same kiel ni prizorgis la tigron."

Kaj ĉiuj aproj komencis supreniri la monteton.

Nun la anakoretaĉo vidis ke amaso da aproj supreniris la monteton, sed la tigro ne. Do li komprenis ke io okazis. Li komprenis ke la aproj mortigis la tigron, kaj ke nun ili sercas ankaŭ lin.

Do li suprengrimpis la plej altan arbon kiun li vidis, figarbo. Sur ties plej altan branĉon li sidigis sin.

Kiam venis la aproj, la apro de la ĉarpentisto vidis la anakoretaĉon sidantan sur la plej alta branĉo de la figarbo. Li tuj komprenis kion fari.

Li ordonis al ĉiuj aprinoj alporti akvon, tiom multe kiom ili povis havi en siaj buŝoj, kaj verŝi ĝin ĉirkaŭ la figarbo.

Poste, li ordonis al la junaj aproj fosi per siaj

muzeloj la teron ĉirkaŭ la figarbo.

Tiel ili nudigis la radikojn de la figarbo. Tiam la apro de la ĉarpentisto genuiĝis kaj ektranĉis la radikojn per siaj dentegoj. Baldaŭ la plej multaj radikoj rompiĝis. Tiam la figarbo falis kun granda bruo, kaj la anakoretaĉo falis ankaŭ li.

Post tio, la anakoretaĉo ne vivis longe. Ĉiuj aproj atakis lin. Ili disŝiris lin kaj voris lin.

Antaŭ ol forlasi la monteton, la apro de la ĉarpentisto demandis la aliajn aprojn:

"Ĉu vi havas pli da malamikoj?"

"Ne plu, dankon," la aliaj aproj diris. "Ili elĉerpiĝis. Vi donis al ni bonan instruon de porkaranismo. Ĉu vi volas esti nia reĝo, kaj protekti nin ankaŭ estontece?"

"Nu bone," diris la apro de la ĉarpentisto.

Tiam ĉiuj aproj ĉirkaŭrigardis. Ili ekvidis konkon, el kiu la anakoretaĉo kutimis trinki, dum li vivis. Kiam ili pli bone rigardis ĝin, ili vidis ke ĝi tordis sin ne en la kutima direkto de konkoj, sed en la mala.

La aproj plenigis tiun konkon per akvo. Ili sidigis la apron de la ĉarpentisto sur la radikon de la figarbo, en kiun la anakoretaĉo grimpis. Poste ili verŝis la akvon en la konko el la konko, super la kapon de la apro de la ĉarpentisto.

Kaj tiun ekzemplon oni longtempe sekvis en

Hindio, ja dum multaj jarcentoj, kiam oni tie kronis reĝojn. Oni sidigis la reĝon sur seĝon de figarba ligno. Poste oni verŝis super lian kapon akvon el konko, kiu tordis sin ne en la kutima direkto de konkoj, sed en la mala.

Ĝuste tial oni tie faris tiel.

## **Nandio, la cervo**

Iam la estonta Budho naskiĝis kiel cervo, nomita Nandio.

En la lando kie tio okazis regis reĝo, kiu tre ŝatis ĉasi. Ĉiutage li ĉasis cervojn. Tiam lin akompanis tiom da homoj, ke la kamparanoj ne povis kultivi siajn kampojn. La akompanantoj de la reĝo malhelpis tion ĉie.

Tion la kamparanoj ne ŝatis. Tial ili kunvenis por diskuti la aferon.

Ili diris:

"La reĝo detruas nian kultivadon. Ĉiutage li ja ĉasas cervojn. Tiam lin akompanas tia amaso da homoj, ke ni ne povas kultivi niajn kampojn. La reĝakompanantoj tion ĉie malhelpas. Estos katastrofo por ni kaj niaj familioj. Ĉi tiel ne povas daŭri. Ni devas fari ion."

Kaj ili plue diris:

"Proksime al ĉi tie situas parko. Ĉu ni eble metu barilon ĉirkaŭ ĝi? Ĉu ni eble metu pordon en la barilo? Ĉu ni eble fosu basenon en la parko? Ĉu ni eble semu herbon tie? Poste ni povus eniri la arbaron kun bastonoj kaj klabo en la manoj, batadi per ili kaj bruegi. Tiam la cervoj ektimus kaj komencus ĉirkaŭkuradi. Tiam ni povus peli ilin al la parko, tra la pordo en la barilo, kaj fermi la pordon. Post tio, la reĝo povus ĉasi la cervojn en la parko kaj ne plu

ĝenus nin. Do, tiel ni faru!"

Kaj tion dirinte, tiel ili faris. Kune, ili iris al la parko, Kune, ili faris barilon kun pordo. Kune, ili fosis basenon kaj semis herbon.

Poste ili eniris la arbaron, kun bastonoj kaj klaboroj enmane, ekbatadis per ili kaj ekbruegis. Kiel antaŭvidite, la cervoj ektimis kaj komencis ĉirkaŭkuradi. Kaj la kamparanoj pelis ilin en la parkon, tra la enbarila pordo, kaj fermis tion post ili.

Kaj tion farinte, ili vizitis la reĝon kaj informis lin, ke nun ĉiuj cervoj situas en la parko. Do, se la reĝo ŝatas ĉasi ilin, li povas fari tion tie. Tio ja estas pli komforte al la reĝo, ili diris.

Ke tio estas pli komforte ankaŭ al la kamparanoj, ili ne diris. Nur pensis.

Sed ne ĉiuj cervoj estis en la parko. La gepatroj de la cervo Nandio ne estis tie. Nandio savis ilin.

Ĉi tiel li faris:

Kiam la kamparanoj eniris la arbaron, ili iris flanko ĉe flanko, kun bastonoj kaj klaboroj enmane. Nandio kaj liaj gepatroj antaŭ tio eniris densaĵon, por tie serĉi protekton. La kamparanoj starigis sin ĉirkaŭ tiu densaĵo, kaj poste kelkaj el ili eniris ĝin.

Kiam la cervo Nandio vidis tion, li pensis:

"Ĉi tio ne akcepteblas. Ĉi tio povas kaŭzi malbonon al ni ĉiuj tri, al miaj gepatroj kaj al mi. Se mi mem mortos — nu, tio ne tre gravas. Sed miaj gepatroj ne mortu."

Kaj la cervo Nandio iris al siaj gepatroj kaj diris al ili:

"Panjo kaj paĉjo, tiuj homoj kiuj eniris la densaĵon — ili ekvidos nin ĉiujn tri. Sed mi scias kiel fari por ke almenaŭ vi du ne mortu.

Kiam tiuj homoj komencos batadi per siaj bastonoj kaj klaboroj, krii kaj brui, mi tuj elkuros. Sed vi du restu. Tiam, la homoj vidos nur min, ne vin. Tiam, ili certe kredos ke en ĉi tiu densaĵo estas nur unu cervo, ĉar la densaĵo ja ne estas granda. Tiam ili ne ĝenos vin, sed ĉasos nur min."

Dirite, farite. La cervo Nandio starigis sin en la densaĵo kaj aŭskultis atente, kaj kiam la kamparanoj komencis batadi per siaj bastonoj kaj klaboroj, kiam ili komencis kriadi kaj bruadi, li kuris el ĝi. Sed liaj gepatroj trankvile restis en la densaĵo.

Tiam, laŭplane, la kamparanoj ekvidis nur Nandion, ne liajn gepatrojn, kaj kredis ke en la densaĵo estas nur unu cervo, ĉar la densaĵo ja estis tiel malgranda, ili opiniis. Do, ili ĉasis nur Nandion kaj ne ĝenis liajn gepatrojn, ĝuste kiel Nandio estis pensinta.



Forlasinte la densaĵon, Nandio kuris al la aliaj cervoj. La kamparanoj pelis ilin al la parko, tra la pordo en la barilo, kaj fermis la pordon. Post tio, ili informis la reĝon ke nun ĉiuj cervoj situas en la parko.

Tion la reĝo trovis bone. Nun ja estis pli komforte al li.

Ĉiutage li eliris por ĉasi cervojn. Sed nun lin akompanis neniu. Li iris sola al la parko, kie la cervoj nun troveblis. Kaj ĉiun tagon, la reĝo mortpafis unu cervon. Poste aŭ li portis ĝin hejmen, aŭ li sendis iun por preni ĝin. Tiel nun estis multe pli bone por la kamparanoj.

Sed ne por la cervoj.

Antaŭe, kiam ili loĝis en la arbaro, ili povis forkuri kiam la reĝo venis kaj volis mortpafi ilin. Sed ĉi tie en la parko, ili povis kuri nenien.

Do, la cervoj pensis ke ne indas la penon malbonigi situacion jam malbonan. Se eblas kuri nenien, kial kuri entute?

Tial ĉiutage, kiam la reĝo venis por mortpafi unu cervon, unu cervo starigis sin aparte de la aliaj, kaj lasis sin mortpafi. La cervoj mem interkonsentis kiu tiel oferu sin en tiu aŭ alia tago.

Nandio trinkis la akvon en la baseno. Li manĝis la herbon sur la grundo. Sed ne ankoraŭ estis lia vico lasi sin mortpafi.

Post multaj tagoj, liaj gepatroj maltrankviliĝis pri li. Ili tre ŝatus denove renkonti lin. Ili pensis:

"Nia filo Nandio estas same forta kiel elefanto, kvankam nur cervo. Se li ankoraŭ vivas, li certe saltos super la barilo. Poste li venos al ni. Ni sendu al li saluton."

Kaj kiam la gepatroj de Nandio staris apud ŝoseo, ili ekvidis homon pasantan.

Tiam ili demandis lin:

"Ho homo, kien vi iras?"

La homo respondis:

"Al la ĉefurbo."

"Tre bone," la gepatroj de Nandio diris. "Proksime al la ĉefurbo estas parko. Tie, amaso da cervoj estas malliberuloj. Unu el ili estas nia filo, nomita Nandio. Salutu lin de ni, kaj diru ke liaj gepatroj ne plu estas junaj. Ili tre ŝatus denove renkonti lin."

"Tiel mi faros," la homo respondis.

La venontan tagon, la homo venis al la ĉefurbo. De tie, li iris al la parko kun la malliberigitaj cervoj.

"Kiu el vi estas Nandio?" li demandis ilin.

Unu cervo venis al li, kaj diris:

"Ja mi."

Kaj la homo diris:

"Hieraŭ mi renkontis viajn gepatrojn. Ili petis min saluti vin, kaj diri ke ili ne plu estas junaj. Ili tre ŝatus denove renkonti vin."

La cervo Nandio respondis:

"Mi povus veni al ili. Sed se mi tion farus nun, tio ne estus ĝuste. Mi manĝis la herbon de la reĝo. Mi trinkis la akvon de la reĝo. Tial, mi ŝuldas ion al li.

Kaj cetere, estas ankaŭ alia afero. Mi longe vivis kune kun ĉi tiuj cervoj, miaj kamaradoj. Ne estus ĝuste se mi mem forirus kaj lasus ilin en mortiga danĝero. Antaŭ ol mi venos al miaj gepatroj, mi devas aranĝi tiel, ke ĉio estos bone kaj por la reĝo kaj por miaj kamaradoj. Antaŭ ol mi venos al miaj gepatroj, mi devas montri kion mi kapablas. Poste, mi volonte venos. Salutu miajn gepatrojn, kaj diri tion al ili!"

"Tiel mi faros," la homo respondis, kaj foriris.

Kelkajn tagojn poste, estis la vico de Nandio esti mortpafita. Kiam la reĝo venis, Nandio starigis sin apud la aliaj cervoj.

Kaj la reĝo pensis:

"Tiun cervon mi pafos."

Kaj la reĝo prenis sian pafarkon, kaj li metis sagon al ĝia kordo.

Sed Nandio ne similis al aliaj cervoj. Ordinara cervo, en tia situacio, certe timus. Sed

Nandio ne. Ordinara cervo panikus. Nandio ne. Anstataŭe, li kolektis ĉiujn siajn pensojn ĉirkaŭ amo al ĉiuj estaĵoj, kaj homoj kaj bestoj, kaj dioj kaj diabloj. Poste, li kolektis tiun tutan amon, kaj ĝin li donis al la reĝo.

Tion la reĝo sentis. La cervo Nandio staris kviete kaj trankvile, kun la flanko al la reĝo. La reĝo staris kun sago al la arko, kaj li celis per la sago al Nandio; sed pafi li ne povis. Ne kapablis.

Tiam, Nandio demandis la reĝon:

"Kion vi atendas? Kial vi ne pafas? Nur pafu!"

Sed la reĝo respondis:

"Mi ne povas pafi. Mi ne scias kial, sed mi tutsimple ne kapablas."

"Nu," Nandio diris, "eble vi ne fartas tre bone post pafado? Eble vi mem ne fartas tiel bone, se vi mortigas vivemulojn?"

"Nu, tiel eble estas," la reĝo diris.

Kaj li forĵetis la pafarkon kaj ĉiujn sagojn, kaj li diris:

"Pardonu min! Mi lasas vin vivi."

"Nu bone," Nandio diris. "Kaj la aliaj? Ĉu vi lasas ankaŭ ilin vivi?"

"Nu bone," la reĝo diris. "Jes ja."

La cervo Nandio restis ĉe la reĝo ankoraŭ

kelkajn tagojn, kaj parolis kun li serioze. Poste,  
li reiris al siaj gepatroj.

## **La birdkaptisto kaj la koturnoj**

Iam, antaŭ tre, tre longa tempo, la reĝo Brahmadata regis en Banaraso. La estonta Budho tiam naskiĝis kiel birdo, kiel koturno. Li iĝis reĝo de tuta koturnaro, kiu loĝis en arbaro apud Banaraso.

Ene de Banaraso loĝis birdkaptisto. Li vivtenis sin vendante birdojn kaptitajn.

Nun la birdkaptisto komencis veni ĉiun tagon al la arbaro, kie vivis la koturnoj. Tie li kaptis tiom da koturnoj kiom li povis. Poste li prenis la koturnojn, reiris al Banaraso kaj vendis ilin tie.

Ĉi tiel la birdkaptisto faris, kiam li volis kapti koturnojn:

Li kunportis reton. Li kunportis ankaŭ korbon. Unue li kaŝis sin. Poste li imitis la sonon de koturno. Tiam venis amaso da koturnoj kaj sidigis sin sur la teron.

Kiam la birdkaptisto vidis ke amaso da koturnoj sidis surtere, li ĵetis sian reton super ilin. Poste li skuis la flankojn de la reto. Tiam la koturnoj kolektiĝis en la centro. Post tio, la birdkaptisto prenis ilin el sub la reto. Li metis ilin en la korbon, plenigis ĝin, premis ilin por havi lokon al pli da, prenis la korbon koturnoplenplenan, reiris al Banaraso kaj vendis ilin tie.

Unu tagon okazis ke la reĝo de la koturnoj, do la estonta Budho, vokis al si ĉiujn koturnojn de sia koturnaro. Li diris al ili:

"Vidu, tiu birdkaptisto, li kaŭzas multege da malbono al ni. Ni devas haltigi lin. Mi konas manieron. Ĉi tiel ni faru:

Kiam li venontfoje ĵetos sian reton super vin, ĉiu el vi elmetu sian kapon tra la reto. Poste vi ĉiuj flugu samtempe, kun la reto super vi, al densaĵo plena de dornoj. Tie vi surteriĝu, ree enmetu viajn kapojn tra la reto, rampu el la densaĵo kaj reflugu hejmen."

"Tiel ni faros," la koturnoj diris.

La venontan tagon la birdkaptisto venis, kiel kutime, al la arbaro de la koturnoj. Li faris tiel, kiel li kutimis: Unue li kaŝis sin. Poste li imitis la sonon de koturno. Tiam venis amaso da koturnoj kaj sidigis sin sur la teron. Kiam la birdkaptisto vidis ilin surtere, li ĵetis sian reton.

Sed poste, ne plu okazis kiel kutime. Kiam la koturnoj trovis sin sub la reto, ili tuj elmetis siajn kapojn tra ĝi. Poste ili ĉiuj flugis samtempe, kun la reto super si, al dornplena densaĵo. Tie ili surteriĝis, ree enmetis siajn kapojn tra la reto, rampis el la densaĵo kaj reflugis hejmen.

La birdkaptisto tute konfuziĝis. Li gratis

sian kapon. Poste li foriris por serĉi la reton, kun kiu la koturnoj forflugis. Kiam li trovis ĝin, ĝi kuŝis sur densaĵo. La koturnoj ne plu estis tie.

Do, la birdkaptisto suspiris. Li komencis manipuleti por malfiksi la reton de la densaĵo. Tiu laboro daŭris la tutan tagon. Pli rapide li ne povis labori, por ne detrui la reton.

Vespere, la birdkaptisto reiris hejmen. Li kunportis sian reton. Li kunportis ankaŭ sian korbon. Sed en la korbo estis nenio. Tie ne estis koturnoj, ĉar tiun tagon li ne sukcesis kapti koturnojn.

La venontan tagon okazis same: la birdkaptisto venis al la arbaro, kaŝis sin kaj imitis la sonon de koturno. La koturnoj venis kaj sidigis sin sur la teron, kaj li ĵetis sian reton super ilin. Sed kiam la koturnoj trovis sin sub la reto, ili tuj elmetis siajn kapojn tra ĝi kaj flugis, kun la reto super si, al dornplena densaĵo, surteriĝis, ree enmetis siajn kapojn tra la reto, rampis el la densaĵo kaj reflugis hejmen, ekzakte kiel la antaŭan tagon.

Kaj la birdkaptisto foriris por serĉi la reton, trovis ĝin sur densaĵo, denove sen koturnoj, suspiris kaj manipuletadis por malfiksi la reton de la densaĵo, dum la tuta tago, malrapide por ne detrui la reton, kaj vespere li reiris hejmen, kunrete, kunkorbe, senkoturne.



Ankaŭ la postvenontan tagon okazis same, kaj la postpostvenontan, kaj tiel plu, kaj tiel pli plu.

Fine, la edzino de la birdkaptisto koleriĝis. Ŝi diris:

"Kion vi faradas, fakte? Ĉiutage vi venas hejmen kun malplenaj manoj. Ĉiutage vi venas hejmen sen eĉ la plej malgranda koturno. Ĉu vi fakte provas kapti ilin? Aŭ ĉu vi trovis alian knabinon, kaj amindumadas al ŝi tro diligente por havi tempon kapti koturnojn?"

"Ho ne, kara," la birdkaptisto respondis. "Mi ne estas tia, kaj tion vi scias. Ne tial mi venas hejmen malplenmane, sed alikaŭze.

La diablaj koturnoj komencis agi solidare! Ĉiun fojon, kiam mi ĵetas mian reton super ilin, ili tuj elmetas siajn kapojn tra ĝi kaj flugas, kun la reto super si, al dornplena densaĵo, surteriĝas, ree enmetas siajn kapojn tra la reto, rampas el la densaĵo kaj reflugas hejmen, kunordigite kvazaŭ ili organizis sin en sindikaton.

Kaj tie mi staras, sentas min stulta kaj devas manipuletadi por malfiksi la reton de la densaĵo, dum la tuta tago, malrapide por ne detruiri la reton.

Sed kara, ne maltrankviliĝu! Ilia solidareco certe ne daŭros longe. Baldaŭ ili komencos kvereli inter si. Kiam ili faros tion, mi kaptos

ilin ĉiujn; kaj tiam vi certe denove ridetos."

Kaj tiel pensante, li ne pensis malbone.

Unu tagon okazis ke unu koturno surtretis la kapon de alia, kiam ili surteriĝis por manĝi. La koturno surkape tretita koleriĝis. Li demandis:

"Kion vi faras, fakte? Kial diable vi surtretas min surkape?"

"Pardonu min," diris la alia koturno, la koturno tretinta. "Tio ne estis mia intenco. Ne koleriĝu, mi petas!"

"Ne koleriĝu,' vi pepas!" diris la unua koturno, la koturno tretita. "Ne via intenco, ĉu? Tion vi asertas, jes ja, sed mi scias. Mi jam konas vin. Mi bone komprenas ke vi tion faris intence."

"Tute ne," la alia koturno diris. "Mi ja jam diris ke tio ne estis mia intenco. Ĉu vi estas tro stulta por kompreni tion? Ĉu vi pensas malrapide?"

"Mi ĉiam pensas tre rapide," la unua koturno diris. "Kaj mi jam konas vin. Vi estas tiel fiera ke vi kredas ke nur vi portas la pezon de la reto, ĵetita de la birdkaptisto. Kaj se vi kredas tion, vi certe opinias ke vi ankaŭ rajtas treti nin aliajn surkape."

Kaj tiel ili kontinuas, kaj la aliaj koturnoj aliĝis al la diskuto, kaj venis repliko post repliko, senfine.

Kaj la reĝo de la koturnoj, la estonta Budho, li aŭdis kiel ili kvereladis. Tiam li pensis:

"Ĉi tio ne finiĝos bone. Ĉi tiu koturnaro certe pereos. Se miaj koturnoj tiel kvereladas, ili venontfoje ne povos levi la reton. Mi ne povas resti plu ĉi tie."

Kaj li kolektis kelkajn koturnojn kiujn li bone konis, pri kiuj li sciis ke ili ne kutimis kvereli inter si. La koturnareto forflugis de tie, kaj ekloĝis en alia parto de la arbaro.

Kelkajn tagojn poste la birdkaptisto venis, kiel kutime, al la arbaro de la koturnoj. Li faris tiel, kiel li kutimis: kaŝis sin, imitis la sonon de koturno kaj, kiam la koturnoj venis, ĵetis sian reton super ilin.

Kaj kiam la koturnoj estis sub la reto, unu koturno diris al alia:

"Ĉu ne estas vi kiu diris ke, kiam ni lastfoje levis la reton, vi perdis plumon el via kapo? Nun vi havas okazon montri kion vi kapablas. Levu do! Montru al ni kion vi povas!"

"Kaj vi mem?" la alia koturno diris. "Ĉu ne estas vi kiu diris ke, kiam ni lastfoje levis la reton, vi perdis ĉiujn plumojn sur ambaŭflugiloj? Nun vi havas okazon montri kion vi kapablas. Levu do! Montru al ni kion vi povas!"

Sed dum ili tiel kvereladis, kaj la aliaj koturnoj kun ili, la birdkaptisto mem iom levis

la reton. Poste li skuis la flankojn de la reto. Tiam la koturnoj kolektiĝis en la centro. Post tio, la birdkaptisto prenis ilin el sub la reto. Li metis ilin en la korbon, plenigis ĝin, premis ilin par havi lokon al pli da, prenis la korbon koturnoplenplenan kaj reiris al Banaraso kaj al sia edzino.

Tiam lia edzino ridetis.

## **La monaĥo kiu pensadis tro**

Kiam vivis la Budho, vivis ankaŭ monaĥo, nomita Sangharakkhita. Li havis nevon, monaĥo ankaŭ li. La nevo estis juna, do devis servi sian onklon.

Unu tagon Sangharakkhita estis eksterdome. Same lia nevo. La nevo unue revenis al la monaĥejo. Li eniris ĝin. Li balais la plankon por sia onklo. Li metis sur la plankon kuvon akvoplenan, por ke lia onklo povu lavi siajn piedojn; ĉar ĉi tio okazis en lando tre varma kaj polvoplena, kaj ĉiuj monaĥoj ĉiam iradis nudpiedaj.

Sur la planko li aranĝis al sia onklo ankaŭ sidlokon, ĉar seĝojn oni neniam uzis tiam kaj tie. Poste li mem sidiĝis kaj atendis sian onklon.

Kiam la nevo vidis la onklon veni surstrate, li iris renkonte al li. Li prenis lian bovlon — tian bovlon kian havis ĉiuj monaĥoj por ricevi siajn manĝaĵojn — kaj metis ĝin flanken. Post tio, li lasis la onklon sidiĝi en la preparitan sidlokon .

Post tio, li prenis grandan ventumilon, faritan el palmfolioj, kaj komencis ventumi sian onklon, por ke tiu estu pli freŝa, ĉar estis varmege. Post certa tempo, li donis al sia onklo malvarman akvon, ĉar tiu certe soifis, kaj li prenis la akvoplenan kuvon kaj helpis sian onklon lavi siajn piedojn. Fine, li denove prenis

la grandan ventumilon kaj rekomencis ventumi lin.

Nun ĵus okazis ke la nevo ricevis donacon de kelkaj konatuloj. Li ricevis du monaĥajn vestaĵarojn, sed li bezonis nur unu. Do li demandis sian onklon, ĉu tiu eble deziras la alian. Sed la onklo diris:

"Ne dankon. Mi jam havas tiom da vestaĵoj kiom mi bezonas."

Sed tiam lia nevo ĉagreniĝis. Li kredis ke lia onklo ekhavis ion kontraŭ li, kaj ĝuste tial ne volas akcepti la vestaĵaron. Kaj la nevo, starante kaj ventumante sian onklon, ekpensis:

"Aha? Ho ĉu? Mia onklo ne plu ŝatas min, ĉu? Unue li monaĥiĝis, kaj poste ankaŭ mi monaĥiĝis kaj ekservis lin, kaj nun li ne volas akcepti ion de mi. Ĉu tio ne konvenas al li? Aŭ ĉu eble estas mi kiu ne konvenas? Nu, en tia kazo, mi povas foriri. Mi ja ne volas ĝeni lin. Mi ne devas plue esti monaĥo, se tio estas malagrade al li. Mi povas anstataŭe vivi denove ordinaran vivon, vivon de laiko."

Kaj li plie pensadis:

"Tamen, ordinara vivo povas esti malfacila. Dum mi estas monaĥo, aliaj homoj donas al mi manĝaĵojn, ĉar ili fidis min. Ili scias ke monaĥo ne rajtas posedi pli ol li nepre bezonas, kaj ili scias ke monaĥo eble povos helpi ilin se ili iam

bezonos ion tradiskuti. Dum mi estas monaĥo, mi ne bezonas monon. Sed se mi eksmonaĥiĝos, mi ekbezonos ĝin. Do, kiel mi faru?"

Kaj lia pensado kontinuas:

"Nu, mi ja havas ĉi tiun monaĥan vestaĵaron, kiun mia onklo ne volas akcepti de mi. Ĝin mi povos kunporti kiam mi foriros. Ĝi estas farita el bona ŝtofo. Do, se mi vendos ĝin, mi certe ricevos sufiĉe da mono por povi aĉeti kaprion, kaj kaprino kutime naskas amason da idoj. Do, tuj kiam mi havos kapridojn mi vendos ilin, kaj por ili mi ricevos tiom da mono ke mi povos edziĝi.

Post certa tempo, mia edzino kaj mi ekhavas filon. Li ricevos la saman nomon kiel mia onklo, Sangharakkhita. Kiam mia filo havos nur kelkajn monatojn, ni metos lin en bebĉareton, kaj tion farinte, ni vizitos mian onklon. Kiam ni proksimiĝos, mi diros al mia edzino: 'Donu al mi la infanon! Mi volas porti lin.'

Sed tiam, ŝi respondos: 'Vi ne estas kapabla porti infanon! Lin portos mi. Dume, vi povos puŝi la ĉareton.' Kaj tion dirinte, ŝi prenos la knabon. Sed ŝi ne estas tre forta, kaj ŝi ne povas teni lin. Ŝi faligos lin sur la ŝoseon, tuj antaŭ la ĉareto, kaj la ĉareto surveturos lin.

Tiam mi koleriĝos, kaj mi krios al mia edzino: 'Mil diabloj, kion vi faras al la infano?'

Vi kredis ke mi ne kapablos porti lin, ĉu? Vi kredis ke nur vi kapablos porti lin, ĉu? Kaj tamen, vi ne kapablas! Ĉu vi tiel traktas vian propran infanon?'

Kaj tiel dirinte, mi prenos bastonon, kiun mi hazarde havos enmane, kaj mi je mia tuta forto batos ŝian dorson. Ĉi tiel!'

Kaj tion pensante, la nevo plifortigis sian prenon de la ventumilo, per kiu li estis ventumanta sian onklon, kaj je sia tuta forto li batis per ĝi lian kapon.

Tiam lia onklo surpriziĝis.

Sed la onklo estis homo tre saĝa. Li kapablis legi la pensojn de aliaj. Nun li scivolis kion faras lia nevo, ĉar kutime junaj monaĥoj ne batas pli aĝajn monaĥojn surkape, nenial. Do nun Sangharakkhita legis la pensojn de sia nevo, kaj diris al li:

"Ĉu estas tiel malfacile al vi bati vian edzinon, ke vi nepre batu min anstataŭe? Ĉu vi opinias ke mi meritas tion?"

Tiam, lia nevo ege ektimis. Lia onklo ja sciis kion li ĵus pensis! Kaj tiajn pensojn monaĥo preferinde ne pensu. Do la nevo forĵetis la ventumilon kaj ekkuris for plejble rapide.

Sed amaso da aliaj junaj monaĥoj en la monaĥejo ekpensis ke tiel oni ja tutsimple ne faru, do ili postkuris lin. Atinginte lin ili



ekprenis lin, kaj kondukis lin al la Budho.

Kiam la Budho vidis ilin ĉiujn venantajn, li demandis ilin:

"Ho monaĥoj, kial vi venas ĉi tien? Ĉu vi kaptis monaĥon?"

"Jes ja," ili respondis. "Ni kaptis monaĥon."

"Sed kial," la Budho demandis, "vi kaptis lin?"

"Ĉar," ili respondis, "li provis fuĝi."

"Imagu," la Budho diris.

Kaj li turnis sin al la nevo de Sangharakkhita kaj demandis lin:

"Ĉu vere vi provis fuĝi de ĉi tie?"

Kaj la nevo de Sangharakkhita rigardis teren, ĉar li hontis; sed li devis diri la veron, ĉar estis tra malfacile mensogi al la Budho. Do li konfesis sian fuĝprovon. Kaj kiam la Budho pridemandis la kialon, li respondis:

"Mi ne plu sentas min bone ĉi tie."

"Ĉu ne?" la Budho demandis. "Sed kial?"

Do la juna monaĥo rakontis ĉion, kio okazis. Li rakontis kiel li ventumadis sian onklon, sed komencis pensadi pri ĉio alia, kaj finfine li ne plu sciis kie li estas, kaj ekbatis sian onklon.

Kaj la Budho diris:

"Nu ja, ĝuste tiel kutimas esti. La pensoj flugas tien, kien ili mem volas flugi. Foje al la estonteco, foje al la pasinteco, foje al la mala flanko de la tero. Ĉie la pensoj estas, krom tie

kie estas ni mem. Ne multaj povas regi ilin.

Sed tion oni povas lerni."

## Fingroringo

En norda Hindio, proksime al Nepalo, nuntempe troveblas ruina urbo. Ĝia nomo estas Savatthi. Antaŭ jarmiloj, kiam vivis la Budho, ankaŭ tiu urbo vivis. Tiam ĝi estis ĉefurbo de la lando Kosalo.

En Kosalo regis la reĝo Pasenadi. Konsilanto lia estis la pastro Bhaggava Gagga, viro ege klera, edzo de la virino Mantani.

Iam la du geedzoj ekhavis filon, kaj la patro starigis lian horoskopon por ekscii lian estontecon. Leginte la horoskopon, li ektimegis. Ne ĝentila la filo estis, laŭ la steloj, sed naskita en la signo de la rabistoj.

(Tiun signon la nunaj astrologoj ne plu konas, sed tamen laŭdire raboj ankoraŭ okazas.)

En la urbo okazis strangaĵoj. Ĉiuj armiloj en Savatthi komencis brili kvazaŭ brulantaj, ankaŭ la armiloj de la reĝo, ĝuste tiun tagon kiam Mantani naskis la filon de Bhaggava Gagga.

La sekvantan tagon, frumatene, Bhaggava Gagga ellitiĝis. Kiel kutime li iris al la reĝa palaco, al la reĝo Pasenadi, kaj demandis al tiu ĉu li dormis bone.

"Ne," la reĝo diris, "ne bone mi dormis, sed maltrankvile. Noktomeze mi vekigis, kaj mi ekvidis ke miaj armiloj, tie apud la lito, briladis kvazaŭ brulantaj. Mi komprenis nenion. Mi

tordiĝis en la lito, kaj mi ne povis denove ekdormi. Kio, laŭ vi, povas esti la kaŭzo? Ĉu baldaŭ malprosperos mia lando? Ĉu baldaŭ iu mortigos min?"

Kaj Bhaggava Gagga respondis:

"Ne, ne tial. Same okazis en la tuta urbo. Enurbe ĉiuj armiloj briladis lastnokte. Ne pro vi sed pro mi. Lastvespere mia edzino naskis al mi filon. Mi starigis lian horoskopon, legis ĝin kaj ekstremis. Ne ĝentila mia filo estas, laŭ la steloj, sed naskita en la signo de la rabistoj. Kaj enurbe ĉiuj armiloj komencis brili kvazaŭ brulantaj. Ankaŭ viaj, evidente, kaj ĝuste tial."

"Oj ve," la reĝo diris. "Se via filo naskiĝis en la signo de la rabistoj, eble li mem estos rabisto."

"Jes ja estas risko," diris Bhaggava Gagga.

"Se tiel okazos," la reĝo demandis, "se li estos rabisto, ĉu vi kredas ke li estos eĉ rabistestro? Ke li estos tutan rabistaron? Aŭ ĉu li agados sola?"

"Tre verŝajne li agados sola," Bhaggava Gagga respondis. "En nia familio, ni ĝenerale ne tre emas labori grupe. Ni ne estas tre kolektivismaj."

"Nu, do eble ĉio tamen estos en ordo," la reĝo diris.

"Kial? Kaj kiel?" Bhaggava Gagga demandis. "Kion ni faru, laŭ via opinio? Ĉu mi

tutsimple mortigu lin? Mortintoj ja kutime ne faradas kanajlaĵojn."

"Ne," la reĝo diris. "Tio ne estas bona ideo. Mi ne ŝatas mortigi homojn, se tio eviteblas. Mortigi homojn estas iomete malagrabla, laŭ mia opinio. Anstataŭe, lasu lin studi en bona lernejo. Tie li eble pliboniĝos, kaj ne rabistiĝos, malgraŭ ĉio."

"Jen bona ideo," diris Bhaggava Gagga.

"Kaj cetere," la reĝo plue diris, "certigu ke li havos bonan nomon.

Tion la pastro Bhaggava Gagga promesis, kaj li nomis sian filon Neperfortulo.

Kaj Neperfortulo kreskadis. Li iĝis granda kaj forta, kaj ankaŭ prudenta. Kaj bonkondukta.

Plenkreskinte, li ekstudis ĉe la fama universitato en la urbo Taksilo, nordokcidente. Tie, li havis la plej bonan instruiston. Li lernis rapide kaj bone, pli ol liaj kamaradoj.

Kaj liaj kamaradoj enviis lin.

Sed en Hindio, tiutempe, estis deviga regulo: kion ajn instruisto ordonas, tion lia lernanto devas plenumi. Do la kamaradoj de Neperfortulo pensis:

"Se ni sukcesos instigi la instruiston koleriĝi al li, certe li ne havos bonŝancon."

Aranĝi tion ne estis facile, tion ili sciis, ĉar la instruisto tre ŝatis Neperfortulon. Tial la

kamaradoj dividis sin en tri grupojn, por ke ĉiu grupo vizitu la instruiston, sinsekve.

Kaj venis la unua grupo al la instruisto. Ĝi diris:

"Aŭdeblas onidiroj."

"Pri kio?" demandis la instruisto.

"Pri eventualaj planoj," ili diris, "de Neperfortulo rilate al vi."

"For!" la instruisto kriis. "Ne kalumniu Neperfortulon! Li estas kvazaŭ mia filo."

Kaj la unua grupo foriris.

Sed iom poste venis la dua. Ĝi diris:

"Fakte aŭdeblas onidiroj."

"Ĉu? Kaj pri kio?" demandis la instruisto.

"Laŭdire," diris la dua grupo, "Neperfortulo intencas kaŭzi al vi problemojn."

"Fi, for!" la instruisto kriis. "Ne kalumniu Neperfortulon, mi petas! Li ja estas kvazaŭ mia filo."

Kaj ankaŭ la dua grupo foriris.

Kaj fine venis la tria. Ĝi diris:

"Ne pretervideblas ke ĉie oni aŭdas onidirojn."

"Ĉu vere? Kaj pri kio, se mi rajtas demandi?" reagis la instruisto.

"Laŭdire," diris la tria grupo, "Neperfortulo intencas kaŭzi al vi problemojn, kaj tute ne

etajn."

"Fi, iru for!" la instruisto kriis. "Ne kalumniu Neperfortulon, je la diablo! Li fakte estas kvazaŭ mia filo."

"Do kulpigu vin mem," la tria grupo diris. "Ni jam avertis vin. Neperfortulo ne estas tiel deca kiel li ŝajnigas. Se vi ne kredas al ni, vi ja povas mem informiĝu."

Kaj tion dirinte, la tria grupo foriris.

Kaj laŭplane, la instruisto de Neperfortulo komencis ion suspekti. Tri grupoj ja venis, po unu, kaj diris la saman aferon.

La instruisto ekpensis:

"Neperfortulo ne povas resti ĉe mi. Mi devas forigi lin. Mi devas mortigi lin."

Kaj li aldone pensis:

"Mortigi Neperfortulon ne facilos. Granda li estas, kaj forta, multe pli forta ol mi. Mi mem do ne povas mortbati lin. Cetere, mi ja fakte estas lia instruisto. Mi respondecas pri lia sekureco. Se li subite mortos en mia domo, tio ne estos bone por mia reputacio, kaj eble mi ne havos novajn lernantojn. Kiel mi do vivtenos min?"

Sed imagu," li aldonis al si, "imagu se Neperfortulo mem mortigos iun. Aŭ iujn. Eĉ multajn. Se tiel okazos, tre verŝajne li mem estos mortigata. Aŭ rekte de parenco de viktimo sia, aŭ poste sur eŝafodo. Tre oportune."

Nun Neperfortulo ĵus finis siajn studojn. Li estis baldaŭ ricevonta sian studateston. Sed unue, la instruisto havu de li donacon, laŭ propra elekto. Kiun ajn donacon instruisto postulis, lernanto ne rajtis rifuzi.

Kaj Neperfortulo vizitis sian instruiston kaj demandis kiun donacon tiu deziras. La instruisto diris:

"Mil homajn fingrojn mi volas havi, kaj ĉiu estu la eta fingro de dekstra mano. Do mil fingrojn de ne malpli ol mil homoj. Se vi tion donacos, vi havos vian ateston. Se ne, ne."

Neperfortulo protestis. Li diris:

"Tio ne eblas. Ne nenial mi nomiĝas Neperfortulo. Cetere, mia familio ne havas tian tradicion."

Sed respondis lia instruisto:

"Nu, faru kiel vi volas. Sed sen la fingroj, neniun ateston. Elektu mem."

Mallumiĝis antaŭ la okuloj de Neperfortulo. Freneza li sentis sin, kaj pensis:

"Bone. Li havos siajn mil dekstramanajn etfingrojn. Mi mortigos mil homojn por pagi lin."

Tion pensinte, li adiaŭis sian instruiston kaj foriris.

Armilojn li akiris, grandan glavon kaj aliajn, kaj



hejmen li iris, al la lando Kosalo.

Proksime al Savatthi, kie ankoraŭ vivis liaj gepatroj, estis arbaro, nomita Ĝalini. Tie estis alta roko, tuj apud la ŝoseo. Sur ĝi li ekloĝis, kaj ĉiutage li gvatadis la ŝoseon.

Se li vidis iun pasi, li alkuris kaj mortigis lin, per glavo aŭ per klabo aŭ per lanco, kaj fortranĉis lian dekstran etfingron. La kadavron li lasis, sed la fingron li kunportis.

La kolektitajn fingrojn li pendigis en arbo. Birdoj venis kaj manĝis la karnon de la fingroj. Poste Neperfortulo prenis la ostojn de la fingroj, vicigis ilin sur ŝnuron, faris de ĝi ringon kaj pendigis tiun ĉirkaŭ sian kolon.

Tial oni nun komencis nomi lin Fingroringo aŭ, en la tiea lingvo, Angulimala. Oni ja ni plu povis nomi lin Neperfortulo, evidente.

Kaj tiel li daŭrigis. Iom post iom, homoj komprenis ke estas danĝere, kaj ili ne plu venis al tiu arbaro.

Do, kiel akiri la mil fingrojn?

Nu, li komencis vizitadi la vilaĝojn ĉirkaŭe. Li kaŝis sin proksime al vilaĝo. Se iu hazarde pasis, Fingroringo alkuris kaj mortigis lin, per glavo aŭ per klabo aŭ per lanco, kaj fortranĉis lian dekstran etfingron. La kadavron li lasis, sed la fingron li kunportis.

Kaj tiel li daŭrigis. Iom post iom, homoj

komprenis ke estas danĝere, kaj ne plu iu iam pasis liajn kaŝlokojn.

Do, kiel akiri la mil fingrojn?

Nu, li komencis eniri la vilaĝojn. Se iu estis hejme — kaj kutime, iu estis — Fingroringo alkuris kaj mortigis lin, per glavo aŭ per klabo aŭ per lanco, kaj fortranĉis lian dekstran etfingron. La kadavron li lasis, sed la fingron li kunportis.

Kaj tiel li daŭrigis. Iom post iom, homoj komprenis ke estas danĝere, kaj ne plu kuraĝis resti en siaj vilaĝoj. Ili foriris, kaj la vilaĝoj iĝis tute malplenaj. Ne plu troveblis tie ajna homo mortigota.

Do, kiel akiri la mil fingrojn?

Nu, li jam mortigis multajn, fakte ekzakte naŭcent naŭdek naŭ. Restis nur unu por ke li havu la mil fingrojn, por ke li povu donaci ilin al sia instruisto, por ke tiu donu al li lian studateston.

Sed ĉiuj homoj fuĝintaj el siaj vilaĝoj jam translokiĝis al Savatthi, al la mizerulaj antaŭurboj. Kelkaj el ili pluiris al la palaco. Tie ili plendis ĉe la reĝo. Ili ploris kaj informis la reĝon kiel nun statas en la lando Kosalo.

Rabisto estas, ili diris, en la lando Kosalo, en la arbaro Ĝalini, rabisto kiu ade murdas.

Kaj la reĝo komprenis ke io estas farenda. Ĉi tiel ja ne povas daŭri. Ne decas ke estu en lia lando rabisto kiu murdadas.

Do la reĝo Pasenadi ordonis ke Fingroringo estu arestota. Granda policaro elmarŝis por kapti lin.

Sed la virino Mantani, patrino de Neperfortulo, edzino de Bhaggava Gagga — ŝi ja komprenis kiel estas, ke Fingroringo estas Neperfortulo, ŝia propra filo.

Kiam ŝi eksciis ke la reĝo ordonis Fingroringon arestota, ke granda policaro jam elmarŝis por kapti lin, tiam ŝi maltrankviliĝis.

Ŝi iris al sia edzo, al la pastro Bhaggava Gagga, kaj diris:

"Mi intuas ke tiu rabisto Fingroringo, li certe estas nia propra filo. Li certe estas Neperfortulo, kiu ja neniam revenis el la universitato. Nur malaperis. Ni devas helpi lin. Ĉu vi ne povas viziti lin, tie en la arbaro, kaj diri al li ke ĉi tiel li ja tutsimple ne povas daŭrigi? Kaj certigu ke li venos hejmen. Se ne, la reĝo kaptos lin, kaj mortkondamnos lin, kaj ekzekutos lin. Fi!"

Sed la patro de Fingroringo, la pastro Bhaggava Gagga, li opiniis malsame. Li diris al sia edzino:

"Ne. Kun tia filo mi ne volas havi rilaton. Li fartu laŭ siaj meritoj. La reĝo agu al li laŭ sia

volo. Mi ne volas enmiksiĝi."

Tamen la patrino de Fingroringo rifuzis rezigni. Ŝi tutsimple ne povis. Do ŝi foriris sola, al la arbaro Ĝalini, kie estas ŝia filo, por venigi lin hejmen.

Nun Fingroringo jam mortigis multajn, ja fakte ekzakte naŭcent naŭdek naŭ, kaj restis nur unu por ke li havu la mil fingrojn, por ke li povu donaci ilin al sia instruisto, por ke tiu donu al li lian studateston.

Kaj li pensis ke kiun ajn homon li unue renkontos, tiu homo ne longe vivos, ĉar lin li mortigos, por fine havi la milan dekstramanan etfingron en sia fingroringo.

Fine, Fingroringo vidis sian propran patrinon veni laŭlonge de la ŝoseo. Li certe sciis ke estas lia patrino, kvankam li dum multaj jaroj ne vidis ŝin, ĉar sian patrinon oni kutime rekonas; sed li tiom kutimiĝis al murdado ke li ne plu zorgis pri tio. Patrino aŭ ne patrino, li mortigos ŝin por havi ankaŭ ŝian fingron.

Sed ĉi tio okazis dum vivis la Budho, kaj ĝuste tiujn tagojn li loĝis tuj apud Savatthi; kaj tiel saĝa li estis ke li kapablis legi la pensojn de aliaj.

Nun li legis tiujn de Fingroringo, kaj mem pensis ke ĉi tio ja ne taŭgas. Eĉ rabisto kiel Fingroringo ne mortigu sian propran patrinon.

Kaj ankaŭ la Budho do iris al la arbaro Ĝalini, kie li estis certa trovi la rabiston Fingroringo. Survoje li renkontis multajn homojn, kaj ĉiuj diris al li:

"Ho, kien vi iras? Ĉu vi ne scias ke en tiu direkto loĝas rabisto kiu ade murdas? Se vi iras tien, li mortigos vin!"

Sed la Budho diris nenion. Li nur daŭre iris.

Kaj Fingroringo vidis la Budhon veni laŭlonge de la ŝoseo, kaj li pensis ke jen oportuno — se hazarde venas fremdulo, do lasu panjon vivi. Dekstramana etfingro kiel dekstramana etfingro.

Li prenis sian grandan glavon, sian pafarkon kun ĉiuj sagoj kaj amason da tranĉiloj, kaj li komencis postkuri la Budhon.

Sed okazis strangaĵo.

La Budho tute trankvile iradis sian vojon, kaj Fingroringo postkuris lin, tiel rapide kiel li nur povis; tamen la distanco inter ili ne malkreskis.

Fingroringo komprenis nenion. Antaŭe, li postkuris elefantojn, ĉevalojn, cervojn — ĉiuspecajn bestojn, kaj li ĉiam atingis ilin. Neniu besto kapablis forkuri de li. Sed la Budho jes ja, ŝajnis.

Do Fingroringo haltis, kaj li kriis al la Budho:

"He, vi! Haltu!"

Sed la Budho ne haltis. Li tutsimple daŭrigis sian vojon, kaj li diris al Fingroringo:

"Mi jam haltis. Ja antaŭlonge. Haltu ankaŭ vi!"

Tiam, Fingroringo komprenis eĉ malpli. Li diris:

"He, vi! Kion vi volas diri? Mi ja staras ĉi tie senmove, kaj vi daŭre iradas; kaj tamen vi asertas ke vi jam haltis, sed mi ne. Kion vi aludas per tio? Ĉu vi imagas ke mi kredas ion ajn?"

"Tute ne," la Budho respondis. "Tion mi ne imagas. Sed mi iradas nur per la piedoj. En la kapo mi estas trankvila. Vi, aliflanke, estas piede senmova, sed enkape vi kuregas."

Kaj Fingroringo, li ekcerbumis, kaj li cerbumadis, kaj la mallumo antaŭ liaj okuloj malaperis, la mallumo aperinta tiun fojon kiam lia instruisto postulis de li mil dekstramanajn etfingrojn. Kaj Fingroringo pensis:

"Mi fajfas pri la studatesto. Ĝi kostas tro."

Kaj li diris al la Budho:

"He, vi, ĉu mi rajtas iĝi monaĥo via?"

"Bone," la Budho resondis. "Venu, monaĥo!"

Kaj Fingroringo prenis ĉiujn siajn armilojn, kaj li forĵetis ilin, kaj poste li iris antaŭ la Budho kaj salute klinis sin, tri fojojn, ĝis lia frunto tuŝis

la teron.

Kaj tiel la Budho monaĥigis Fingroringon, kaj instruis lin kiel esti bona monaĥo; kaj la Budho kaj Fingroringo kune iris el la arbaro Ĝalini, kie Fingroringo estis loĝinta, al alia arbaro, nomita Ĝeto, tuj ekster Savatthi, kie la Budho kutimis loĝi kiam li vizitis Savatthin.

Sed samtempe, enurbe en Savatthi, tuj ekster la palaco de la reĝo Pasenadi, okazis grandaj manifestacioj. Homoj ariĝis amase, kriadis kaj bruadis, protestante ĉar la reĝo ne ankoraŭ kaptis Fingroringon.

"Necesas pli da rigoro. Necesas apliki pli striktajn rimedojn," ili diris.

Kaj la reĝo pensis ke se io estu farota, evidente li mem devos tion fari. La poliestro certe ne montris rezultojn.

Do la reĝo arigis multajn policistojn, kaj cetere ankaŭ soldatojn, pro sekurecaj kialoj, ĉar Fingroringo ja estis danĝera; kaj ili ĉiuj foriris, el la palaco en Savatthi al la Ĝalini-arbaro.

Survoje ili pasis la Ĝeto-arbaron. Kaj la reĝo Pasenadi pensis ke li povas kapti la okazon viziti la Budhon, ĉar tiuj du estis tre bonaj amikoj. Kaj viziti la Budhon estis facile, ĉar tiu estis ĵus reveninta. Kune kun Fingroringo — sed tion la reĝo ja tute ne sciis.

Do, la reĝo Pasenadi eniris la Ĝeto-arbaron,

kune kun ĉiuj siaj policistoj kaj soldatoj. Tie sidis la Budho kun siaj monaĥoj.

Sed kiam la Budho vidis ke la reĝo Pasenadi venas kun tia amaso da policistoj kaj soldatoj, li iĝis meditema; kaj li demandis la reĝon:

"Kial vi venas kun tiom da policistoj kaj soldatoj? Ĉu estas milito? Ĉu la reĝo Bimbisaro atakis vin?"

(Bimbisaro estis reĝo de la najbara lando Magadho, oriente de Kosalo.)

Kaj la reĝo Pasenadi respondis:

"Estu trankvila. Ne estas milito. Magadho ne atakis Kosalon. Sed troveblas aliaj danĝeroj, Vi certe scias ke tute proksime, en la Ĝalini-arbaro, vivas la rabisto Fingroringo kiu ade murdas, kiu jam murdis multegajn homojn, fortranĉis iliajn dekstrajn etfingrojn, faris de ili ringon kaj pendigis tiun ĉirkaŭ sian kolon. Tiaj kutimoj ja ne akcepteblas. Ni devas haltigi lin. Necesas pli da rigoro. Necesas apliki pli striktajn rimedojn. Necesas nul-toleremo. Do mi ordonis lin arestota. Ĝuste tial, mi venas ĉi tien kun tiom da policistoj kaj soldatoj. Ni devas kapti lin."

Tion dirinte, li iomete cerbumis. Poste, li daŭrigis:

"Almenaŭ estas nia intenco kapti lin. Sed mi dubas ke ni sukcesos. Li certe estas tro danĝera



por ni. Ĉio tutcerte fiaskos."

"Ĉu?" la Budho diris. "Kiel bedaŭrinde! Tamen," li diris kaj fingromontris al unu el la monaĥoj, "ĉu vi vidas tiun monaĥon? Tiun kun la ĝentila mieno?"

"Certe mi vidas lin," la reĝo respondis. "Jes, lia mieno jes ja estas ĝentila. Sed kial vi demandas tion? Ĉu li estas iel aparta?"

"Nu, tion oni ja povas diri," la Budho diris. "Li estas Fingroringo."

Tiam, la reĝo Pasenadi ektimegis. La haroj sur lia kapo stariĝis.

Poste, tamen, li retranskiviligis. Li ja sciis ke por monaĥiĝi fare de la Budho, oni devas unue promesi ne plu suferigi homon intence, nek beston; cetere li sciis ankaŭ ke la Budho estas netrompebla. Li ja povis legi la pensojn de aliaj.

Tion pensinte, la reĝo Pasenadi iris al la monaĥo Fingroringo kaj demandis al tiu, kiu fakte estas lia vera nomo — ĉar "Fingroringo" ja estis nur kromnomo — kaj kiel nomiĝas liaj gepatroj.

Kaj Fingroringo informis lin ke lia vera nomo estas Neperfortulo, ke lia patro estas la pastro Bhaggava Gagga kaj lia patrino Mantani.

La reĝo miris. Ĉi tiu Fingroringo ja estas la filo mem de lia propra konsilanto, pri kiu li parolis kun Bhaggava Gagga kiam la knabo estis ĵus naskita, kaj al kiu oni donis la nomon

Neperfortulo por ke li estu pacema! Kio ja ne tute sukcesis, evidente. Kaj nun, tiu knabo estas jam monaĥo.

Kaj la reĝo Pasenadi diris al la monaĥo Fingroringo:

"Se vi tion deziras, mi povas certigi ke vi ricevos ĉion, kion monaĥo bezonas: manĝaĵojn, vestaĵojn, loĝlokon kaj, se necese, medicinon."

"Koran dankon," Fingroringo respondis, "sed ĉio jam estas en ordo. Multajn fiaĵojn mi faris, do ekde nun mi vivos tre simple. Mia nura manĝaĵo estu tiu, kiun donacos al mi la vilaĝanoj, kiam mi antaŭtagmeze trapasos la vilaĝon. Al mi sufiĉu unu aro da vestaĵoj, kaj kiam tiu estos eluzita, mi ie trovos ĉifonojn por fari novan. Sub la ĉielo mi dormu, kaj se mi malsaniĝos, la aliaj monaĥoj helpos min."

"Bone," la reĝo respondis.

Kaj al la Budho li diris:

"Nu, ĉio ja tamen finiĝis bone, sed nun vi devas senkulpiĝi min, ĉar mi devas foriri. Multo farotas, multo farendas."

"Vi faru kion vi devas," la Budho respondis.

Kaj la reĝo Pasenadi, kune kun ĉiuj siaj policistoj kaj soldatoj, iris for de tie kaj reen al la palaco, reen al Savatthi.

Sed la monaĥo Fingroringo komencis mediti. La tutajn tagojn li meditadis, kaj grandan parton de

la noktoj. Li ne pensadis, li ne cerbumadis, li nur atentadis tion kio okazas ene de li, kaj tion kio okazas ĉirkaŭ li; tion kio komenciĝas ene de li, kaj tion kio komenciĝas ĉirkaŭ li; tion kio daŭras ene de li, kaj tion kio daŭras ĉirkaŭ li; kaj kiel tio ĉesas.

Tiel li faris la tutajn tagojn, kaj grandan parton de la noktoj. Kaj tiel farinte dum certa tempo, li ekkomprenis kiel ĉio vere estas. Ne nur per la kapo li tion komprenis, sed per la tuta korpo kaj per la tuta psiko. Li ĉesis provi teni la neteneblan, konservi la nekonserveblan, eternigi la neeternan, deziri ke ne ŝanĝiĝu la nepre ŝanĝiĝonta.

Kaj tiel li tute liberiĝis.

Sed ne ĉiuj povis forgesi kion Fingroringo faris antaŭe.

Ĉiun antaŭtagmezon, Fingroringo nun kutimis preni sian bovlon — tian bovlon kian havis ĉiuj monaĥoj por ricevi siajn manĝaĵojn — kaj eniri Savatthin por ricevi manĝaĵojn. Tie li iradis de domo al domo. Li ne almozpetis. Kiam li venis al iu domo, li nur ekstaris ekster la pordo kun la bovlo enmane, kaj tie li staris dum mallonga tempo, tute trankvila. Foje venis iu kaj metis iom da manĝaĵo en la bovlo. Tiam li ridetis kaj daŭrigis sian iradon al alia domo. Foje li ricevis nenion. Ankaŭ tiam li ridetis kaj

daŭrigis sian iradon al alia domo.

Iun tagon li tiel eniris la urbon, kaj tiel ĉirkaŭiradis laŭ sia kutimo.

Sed en la urbo estis kelkaj kiuj nun ekvidis lin, kaj kiuj ne ŝatis lin, ĉar ili memoris kion li antaŭe faris. Do iu prenis ter-bulon kaj ĵetis al li, iu prenis bastonon kaj batis lin.

Kaj tute frakasita, kun kapo sanganta, kun bovlo detruita, kun vestaĵoj ŝiritaj, Fingroringo reiris al la Ĝeto-arbaro kaj denove renkontis la Budhon.

Tiu rigardis lin, kaj diris al li:

"Ĝoju, Fingroringo! Estu ĝoja, ke ĉi tio okazis jam nun. Multajn fiaĵojn vi faris, do neniel mirinde ke ĉi tio okazis. Ĝoju ke post viaj fiaĵoj, vi vivis tiel meritige. Alikaze okazus multe pli, ne nur dum ĉi tiu vivo sed ankaŭ dum venontaj vivoj, dum centoj kaj miloj da jaroj. Agoj naskas sekvojn."

Kaj Fingroringo konsentis.